

Bulgara Esperantisto

Julio 1989



ENHAVO

- 2 „Bulgara Esperantisto“ en mia vivo (Nikola Aleksiev)
- 3 Jubileo de elstara veterano (Raja Androvska)
- 4 En sino de Rodopi-montaro... (Manol Ĉolev)
- 6 Violin Oljanov — 70-jara (prof. d-ro Kiril Popov)
- 7 Kiam mi estis ĉefredaktoro... (Violin Oljanov)
- 9 El la malnovaj paĝoj
- 14 Juna Esperantisto
- 15 Kanto „Maltrankvilo“ (Vesa Maleva, Nikolaj Dobrinov)
- 19 Enlanda movado
- 24 Ni recenzas (Venelin Mitev)
- 26 Tra la mondo
- 27 Mezopotamio kaj Babilono (Georgi M. Miĥajlov)
- 29 Antaŭen al Marso! (Kiril Velkov)
- 30 Panoramo de esperantistaj atingoj (Atanas Ilkov)
- 32 Deziras korespondi
- III Ne forgesu!
- IV Distroj

Ĉefredaktoro: Maria JANKOVA

Redaktoroj: Evĝeni GEORGIEV kaj Rumjana GEORGIEVA

Redakcia Konsilantaro: Dimităr HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Kunĉo VALEV, Nikola NIKOLOV, Venelin MITEV

Adreso de la redakcio: „Ĥristo Botev“ 97, 1303 Sofio — Bulgario, tel. 22-80-86

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“ bul. „Lenin“ 117, 1113 Sofio

Al la kunlaborantoj: Kontribuaĵojn por la koncerna numero ni akceptas du monatojn antaŭe. La materialoj devas esti koncizaj kaj konkretaj, verkitaj nur en Esperanto, tajpitaj aŭ klare skribitaj. Por publikigo sendu bonkvalitajn fotojn. La Redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn.

Abonkondiĉoj: En Bulgario „Bulgara Esperantisto“ estas abonebla per la poŝto, kontraŭ 4.80 lv. En ĉiuj socialismaj landoj — per la koncerna poŝto. Por aliaj landoj — pere de UEA aŭ per niaj perantoj, kontraŭ 32 nederlandaj guldenoj aŭ egalvaloro en nacia valuto. La abonprezo por socialismaj landoj en Bulgario estas 7.32 lv., por la ceteraj landoj 7.80 lv. Prezo de unuopa ekzemplero 0.50 lv. aŭ 3 ned. gld.

„Bulgara Esperantisto“ havas abonantojn en 47 landoj.

Estas organizita regula surbendigo de „Bulgara Esperantisto“ por la bezonoj de la blindaj esperantistoj.

Sur la unua kovrilpaĝo: Malnovaj numeroj de revuo „Bulgara Esperantisto“.

Foto: Kirilka SAVOVA



El nia leterkesto

MIA DANKO KAJ PROPONO

En la redakcio de „BE“ ankoraŭ venas leteroj, en kiuj la legantoj esprimas sian kontenton pro la serioza plibonigo de la revuo. Por ilustri tion ni citas parton de unu el la ricevita leteroj.

„... Mi esprimas mian kontenton pro la bona presado, legeblaj litertipoj kaj pli bona papero de nia renoviginta presorgano. Ĝuste pro manko de la menciitaj ecoj ĝis antaŭnelonge, mi estis malkutimiĝinta legi la revuon. La oktobran numeron mi tralegis la tutan, dum tri horoj, ripozante, mi ĝuis ĝian varian enhavon. La materialo pri la 3-aj Turistaj Esperanto-Tagoj en Sofio donas imagon pri vere signifa Esperanto-aranĝo, bonege prezentita per teksto kaj bildoj. Mi deklaras, ke sekventjare ankaŭ urbo Ŝumen havos reprezentantojn en tiu ĉi aranĝo.

Mi esprimas la dankon de la legantoj al la Redakta Komitato pro la bona redaktado. Unu sugesteton al vi — estu publikigataj pli da materialoj pri okazontaj esperantaj aranĝoj, ne sole pri la pasintaj. Vi ja konsentas, ke la presorgano estas ankaŭ organizanto!...”

Inĝ. Stefan N. GEORGIEV
P. K. 562

9701 Ŝumen, Bulgario

Jaro 58

N-ro 7

Bulgara Esperantisto

**ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO, FONDITA EN 1919,
DISTINGITA PER ORDENO „KIRIL I METODIJ” — I GRADO**

FELIĈAN FESTON!

Maria JANKOVA

ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto”



Grafikaĵo: Bogomil JIVKOV

Gratulojn al vi, ĉiuj legantoj, kunlaborantoj, amikoj de revuo! Gratulojn okaze de la 70-jariĝo de „Bulgara Esperantisto”!

Ĝi travivis sufiĉe da jaroj por pruvi siajn meritojn esti heroldo de la bulgara esperantistaro kaj informilo pri Bulgario al siaj eksterlandaj legantoj. Venis unu post alia helaj periodoj en la revua historio kaj malfacilaj momentoj. Estis sociaj tempestoj, kiam „Bulgara Esperantisto” stagnis, estis ankaŭ tagoj de revua supreniro — venis nova prestekniko, novaj homoj, talentuloj kun novaj ideoj. Tiamaniere en la revuan organismon enfluis freŝa sango kaj pli juna generacio anstataŭis la antaŭan. Ĉiu laŭ sia ordo. Kaj tiel de jaro al jaro ĝis nun, ĝis nia tempo... Ĉu ni bone laboras aŭ ne sufiĉe — tion diros niaj legantoj kaj

poste — la voĉo de la historio. Sed mi nur povus diri en la nomo de miaj kolegoj, ke ni laboras laŭ niaj kapabloj, zorgeme gardante la revuajn tradiciojn, konstruatajn fare de la antaŭaj ĵurnalismaj generacioj. Tiusence hodiaŭ ni tre ĝojas al la helpo de niaj antaŭuloj kaj ni kaptas la okazon kore kaj sincere danki al ili.

Dum la tuta jaro okaze de la revua jubileo per la rubrikoj: „70 jarojn „BE”, „El la malnovaj paĝoj” kaj „Kiam mi estis ĉefredaktoro...” ni strebas doni al nia legantaro pli vastan imagon pri la revuo el la diversaj etapoj de ĝia disvolviĝo. Tiamaniere senpere la legantoj ekscias pri la organiza sperto de la bulgaraj esperantistoj, pri la stato kaj funkciado de BEA dum diversaj historiaj periodoj.

La samajn rubrikojn ni uzas ankaŭ en tiu jubilea numero de „Bulgara Esperantisto”. Per la valora helpo de la ununura ĝis nun revua esploranto Krâstju Karucin ni atentigas vin pri la verkoj de iuj el la plej famaj aŭtoroj de „Bulgara Esperantisto”. Tio estus ankaŭ unu leciono pri movada historio al la pli junaj kaj novaj samideanoj.

Kaj nun, agrablan legadon, feliĉan festadon kun ni inter la 22-a kaj la 24-a de septembro k. j. en Velingrad kaj dankojn, karaj amikoj pro viaj sinceraj salutoj okaze de la jubileo!

„Bulgara Esperantisto“ en mia vivo

Jam de la komenco de mia esperantista agado mi estas intime ligita kun la plej malnova esperanta revuo en nia lando — „Bulgara Esperantisto“.

Post mia esperantistiĝo en 1924 mi ekdeziris aboni Esperantan revuon. Bonŝance jam dum mia unua vizito al Sofio en 1925 mi sukcesis realigi tiun ĉi deziron.

Tiutempe Sofio estis urbo kun ĉ. 250 mil loĝantoj, situanta sur dekono de la nuna ĉefurba teritorio. Estis sufiĉe facile orientiĝi en la urba labirinto eĉ por provincano, kiu unuafoje vizitas la ĉefurbon. Do mi trovis straton „Car Boris“, ĉe kiu troviĝis la kancelario de BEA. Ĝi konsistis el nuraj du ĉambroj.

Mi pagis la abonkotizon de la revuo kaj aĉetis kelkajn esperantajn librojn. Tiel mi estiĝis regula leganto de „BE“. Nur kiam mi troviĝis en la prizonoj de faŝisma Bulgario aŭ estis perforte transloĝigita el Sofio (kies loĝanto mi estis depost 1926), mi ne havis eblecon legi „BE“. Tio forprenis de mi la revuon preskaŭ dum dek jaroj...

Miaj unuaj impresoj de la materialoj publikigataj en la paĝoj de l'revuo estas tiom fortaj, ke ankoraŭ nun mi rememoras temojn kaj aŭtorojn de tiu periodo. Mi estis mirigita de la esperantaj tradukoj de Asen Grigorov el la poezio de famaj bulgaraj poetoj. Al mi sonis kiel muziko lia traduko de la poemo „Malĉasta princino“ de Dimĉo Debeljanov. Mi memoris dum multaj jaroj originalajn poemojn de la tre kapabla poeto Miti. Multpromesa estis ankaŭ la originala kaj traduka poezio de Zahari Zahariev. Versoj de li mi memoris dum jardekoj. Geo Hârşev estis bonega tradukinto de prozaĵoj el bulgaraj klasikuloj kaj modernaj aŭtoroj. La artikoloj de Atanas D. Atanasov (ADA) pri movadaj temoj estis ne nur interesaj laŭ enhavo, sed ankaŭ verkitaj en modela Esperanto.

Mi kompreneble ankaŭ faris provojn traduki en Esperanton kaj sendi miajn kontribuojn al la Redakcio. Mi poste komprenis kiel malbonkvalitaj estis tiuj miaj „traduka-

ĵoj“. Tute nature, ili neniam aperis en la paĝoj de „BE“, sed mi eĉ hodiaŭ ofte rememoras la rubrikon „Krioj el la paperkorbo“, kie oni konsilis similajn al mi „kunlaborantojn“ kiamaniere ili povus atingi sukceson en sia literatura agado. Iu mia „kolego“ eĉ petis la Redakcion sendi al li „honoraron“. Sed la Redakcio respondis al li tre sprite: „Honoraron ni povas sendi al vi en granda kvanto, tamen honoraron vi neniam ricevus“. La malfeliĉa aŭtoro ne povis fari diferencon inter la vortoj „honoraro“ (aro da honoroj) kaj „honorario“...

Kiam en nia lando komencis aperadi laborista esperanta revuo „Balkana Laboristo“ (komence de 1929) mi uzis ĝiajn paĝojn por disputado kun la organo de BEA „BE“. Poste evidentiĝis, ke ne ĉiam mi estis prava... Dum la lastaj jaroj antaŭ la fino de la Dua mondmilito la faŝisma reĝimo fakte sufokis ankaŭ „Bulgaran Esperantiston“.

Post la liberigo de nia lando el sub la faŝisma jugo (9.09.1944) „BE“ ludis gravan rolon en la klopodoj krei bone organizitan E-movadon. Por la preparado kaj organizado de la landaj kongresoj de BEA ĝi faris multon. Ankaŭ por la kreo de konvena atmosfero por la okazigo de du universalaj kongresoj en Bulgario — la 48-a en Sofio kaj la 63-a en Varna „BE“ merite kunlaboris al LKK kiel propagandisto kaj organizanto.

Post 1964 ĝis 1976 kiel prezidanto de BEA mi utiligis ofte la paĝojn de l'revuo por publikigo de organizaj kaj direktivaj artikoloj, impresoj kaj konkludoj pri nialandaj kaj universalaj kongresoj.

Tre pozitive rolis „BE“ ankaŭ por la prelaboroj kaj okazigo de pluraj internaciaj kaj landaj E-aranĝoj en Bulgario (kongresoj de TEJO, IFEF k. a., konferencoj de MEM, konsultiĝoj de E-asocioj el socialismaj landoj, internaciaj laborbrigadoj de Esperanto-junuloj, E-festivaloj kaj baloj, recitaloj de Esperanta poezio kaj kanto...).

Post kiam la prezidanteco de BEA transiris al Ĥristo Gorov (ĝis la fino de 1987) kaj poste al Sava Dâlbokov mi daŭre restis

kunlaboranto de „Bulgara Esperantisto“ kaj ties legantoj. Ĝi digne plenumas sian rolon de organiza kaj kultura tribuno de BEA. Mi estis feliĉa akcepti el la manoj de l'prezidanto de Bulgara Parlamento la oran ŝtardonon „Kiril i Metodij“, per kiu la revuo estis distingita okaze de ties 50-jariĝo.

Jen nur kelkaj linioj pri la rolo de „BE“

en mia esperantista vivo. Momente ni festas ties 70-jariĝon kaj mi uzas la feliĉan okazon bondeziri al la redakcianoj de la revuo novajn rimarkindajn sukcesojn por la bono de bulgara esperantistaro kaj serve al la intereso de nia lando Popola Respubliko Bulgario.

Nikola ALEKSIEV

JUBILEO DE ELSTARA VETERANO



Sava Dălbokov, prezidanto de BEA, gratulas la jubileanton.

Ĉi-printempe elstara veterano de bulgara Esperantomovado Radoslav Triĉkov estiĝis 90-jara. Okaze de tiu jubileo la sociaj organizaĵoj

en Vraca, Urba Kulturdomo „Razvitie“ kaj la loka Esperanto-societo „Sukceso“ okazigis solenaĵon en la pentrajgalerio je la 6-a de

aprilo k. j. Ĉeestis multaj loĝantoj de Vraca, reprezentantoj de kulturaj kaj sociaj institucioj, gastoj el diversaj lokoj de la lando.

Prezidanto de la Urba Legejo „Razvitie“ Dimităr Georgiev prezentis la riĉan, enhavan kaj diversan agadon de Radoslav Triĉkov. Restinta viva post la mort-verdikto de la faŝistoj en la Septembra Ribelo — 1924, li fondis en Vraca la lokan Esperanto-societon „Sukceso“ kaj metis komencon al la unuaj E-kursoj. Esperantisto li fariĝis en 1914 dank' al Ivan Krestanov. De tiam li gvidis pli ol 70 E-kursojn kaj kreis ĉirkaŭ 3000 esperantistojn. R. Triĉkov partoprenis multajn E-kongresojn, vizitis dekojn da landoj en ĉiuj kontinentoj. Riĉa estas lia korespondado.

Radoslav Triĉkov estas ankoraŭ aktiva kulturaganto. Li partoprenis spektaklojn de la urba teatro, gvidis elsendojn de la loka radioreto. Triĉkov estis ankaŭ prezidanto de la Urba Kulturdomo. Nek la jaroj, nek la malfacilaĵoj en la vivo ŝanĝis lian gajan karakteron — lian viklecon kaj bonhumoron.

Okazis solenaĵo honore al R. Triĉkov. Nome de BEA salutis ĝia prezidanto Sava Dălbokov. Li dekoris la jubileulon per ordeno „9-a de septembro“ — unua grado, por lia aktiva partopreno en la kontraŭfaŝisma movado kaj pro vigla kontribuo al socialisma konstruado en Bulgario.

R. Triĉkov estis salutita ankaŭ en la nomo de multaj sociaj, kulturaj organizoj, E-societoj kaj kluboj. Oni voĉlegis ricevitaĵojn telegramojn el Moskvo, Minsko, Havano, Lisbono k. a.

Radoslav Triĉkov varme respondis al la salutoj kaj la bonaj vortoj.

Raja ANDROVSKA

En sino de Rodopi-montaro

En oceano de pinarbaroj, kie torrentoj petolas sen baro, troviĝas la urbo de Vela Velingrad.

En tiu benita regiono la naturo ŝlosis ĉarmajn per „paradize hela Ĉepina valo“ (Vazov). En okcidenta parto de la valo brilis ĝia ornamo Velingrad. Antaŭ 64 jaroj, meze de la pinoj, naskiĝis la unua esperantista societo „ĈE-PINO“.

Kiam temas pri Velingrad kaj ĝia regiono, ni devas emfazi, ke dum pluraj jarcentoj de la antikveco, de la Romia kaj Bizanca epokoj, la regiono de la nuntempa Velingrad estis alloga por la homo. Ĝiaj belaĵoj kaj ĉefe ĝiaj riĉaĵoj altiris la homojn: maro de pinarbaroj, subĉielaj monto-pintoj, freŝa kaj saniga aero kaj krome la ŝprucantaj 200 l en sekundo diverstemperaturaj kaj diversenhavaj termakvoj el 70 fontoj. Jen estas la riĉaĵoj de Velingrad!

Nuntempe ĝia allogeco ne perdis sian forton. Ĉiujare 300 000 ripozantoj el nia lando kaj fremdlando direktiĝas al Velingrad reakiri fortojn kaj sanon.

Sed antaŭ 14 jaroj, ni, la esperantistoj de Velingrad konstatis, ke nia urbo kun siaj riĉaĵoj estas alirebla por ĉiuj, sed ne por esperantistoj. Ni prenis la ideon, ke Velingrad paralele kun la bankuraca, turisma bazo, estiĝu ankaŭ esperantista bazo. Al tiu ĉi ideo nin direktis niaj gekorespondantoj el fremdlando. Ni sentis devigon doni eblecon al la esperantistaro el la mondo ĝui la belaĵojn kaj ĉerpi plenmane el la riĉaĵoj de nia urbo. Ni fondis Internacian Seminarion-Feriadon en 1975.

Kaj jen, jam 14 jarojn la Seminario funkcias, vivas, evoluas. Ni ne eraris. La eldiroj kaj la impresoj de la gastoj pravas tion. Estas konstatale, ke per nia aranĝo ni plenumas gravajn kaj noblajn taskojn.

— doni eblecon al la esperantistoj ripozi, perfektigi lingve, refreŝigi kaj reakiri fortojn en amika, esperantista etoso.

— kontribui kaj doni realan esprimon al la monda alvoko pri paco, frateco kaj internacia amikeco.

La rezultoj estas neatenditaj. Velingrad estis malkovrita por la esperantistaro de la mondo. Ĉiun jaron en septembro (18—28-a) venas esperantistoj el Eŭropo kaj tuta mondo. Fine ili entuziasmigita kaj ravita adiaŭas niajn esperantistojn kaj la urbon.

Nia memrorlibro abundas je pozitivaj, entuziasmaj eldiroj kaj impresoj. Absolute ne eblas citi ĉiujn. Mi mencias nur kelkajn el ili:

Linhard Riznar el ĈSSR nomis Velingrad „nova esperantista hejmo“.

D-ro Marian Laba el Pollando, en sia ekstazo diris: „Velingrad estas nova E-paradizo!“. Aliaj esperantistoj nomas Velingrad kaj nian aranĝon mirindaĵo.

Ekzistas tamen ankaŭ aliaj gravaj flankoj de nia iniciato. Per nia seminario ni plenumas gravan patriotan taskon: ni montras al la gesamideanoj el la kapitalismaj landoj la veran vizaĝon de nia socialisma sociordo.


Jen ekzemplo: En 1983 nian seminarion partoprenis Johano Kjuispel el Nederlando. En intervjuo kun niaj ĵurnalistoj li diris, ke li estis ravita de Bulgario.

Ankaŭ venis emociaj artikoloj de la entuziasmigita partoprenantoj: en „Pola Esperantisto“, en „Ruĝa Stelo“, en „Soveta Klajpeda“, en „Ro diomskie slovo“, Drogoŭiĉ k. t. p.

Al vi, karaj esperantistoj el la mondo, batalantoj por paco kaj internacia amikeco, amikoj de la naturo, ni direktas nian inviton. Estu bonvenaj!

Manol COLEV,
Velingrad

Noto de la Redakcio: Kiel ni jam menciis en n-ro 2/1989 de „BE“, la Festo de „Bulgara Esperantisto“ okazos de la 29-a de septembro ĝis la 1-a de oktobro ĉi-jare en Velingrad enkadre de la aranĝo „Tra arbaroj kaj kamparoj“. Pliajn informojn petu de: inĝ. Boris Gaĝanov, str. „Petăr Janev“ 21, BG—4600 Velingrad. Lasta dato por aliĝo: 15-a de aŭgusto 1989.



Velingrad — vidaĵo de urba parko

Foto: V. HUBENOV

NIA E-KLUBO

Karaj geredaktoroj!

Unue mi kore salutas vin pro la sukceso farita bela, interesa kaj bonkvalita revuo. Ĝin mi ŝatas legi kun niaj geklubanoj. En la lasta numero mi trovis krucenigmon, kiun tre ĝojigis min.

Nun mi prezentos al vi nia E-klubo.

Esperanto klubo „Puĥovano“ laboras ĉe Domo pri Kulturo en Púchov. „Puĥovano“ estas malmultenombra E-klubo kaj ekzistas nur de septembro 1987, sed ni kunvenas regule kaj preskaŭ ĉiam venas ĉiuj geklubanoj. Niaj kunvenoj estas interesaj kaj nia agado estas sufiĉe riĉa. Dum nia mallonga ekzisto ni sukcesis akiri kunlaboron kun najbaraj Esperantaj kluboj. Ni partoprenas iliajn entreprenojn kaj el ili ni akiras sciojn, amikojn kaj amuzojn. Valoraj estis renkontiĝoj kun E-klubo en Žilina, Senica, Považská Bystrica kaj kun alilandaj geesperantistoj el Sovetunio, Francio kaj Aŭstrio.

Gaja estis laborbrigado en Poprad ĉe ordigo de korto, de nia asocia domo. Kunve-

nis tie geklubanoj el pluraj E-klubo. Bone estis en Poprad ankaŭ dum Somera Esperanto-Lernejo kaj dum Asocia ekzameno pri scio de Esperanto. Vespere ni spektis diapozitivojn el Sovetunio kaj el Bulgario. Ili postlasis al ni belajn travivaĵojn. Inĝ. Milan Zvara bone prezentis per detala klarigo la menciitajn landojn. Al Esperanto ni ŝuldas niajn dankojn pro la neforgeseblaj travivaĵoj.

Mi sendas al vi provon pro poemo de mia filino Mária Radkovičová.

Kun multaj sinceraj salutoj kaj bondeziroj mi esperas akiri kunlaboron kun iu Esperanto-klubo el via bela lando.

Ludmila MINÁROVA,


Nosice 130

CS 020 01 Púchov,

Ĉeĥoslovakio

Noto de „BE“. Ni dankas al s-ino Minarova pro sia varma letero kaj bondeziras al ŝi persone kaj al la E-klubo en Puchov plurajn E-sukcesojn kaj al Maria Radkovičova gravajn poeziajn atingojn.

Violin Oljanov — 70-jara



Kara kolego Oljanov,

Ni gratulas vin okaze de via 70-jariĝo kaj bondeziras al vi fortikan sanon, pluan viglan laboron kaj sukcesojn en via poresperanta agado kaj privata vivo.

Ni estas tre dankaj al vi pro la valoraj konsiloj kaj sugestoj pri la aranĝo, enhavo kaj stilo de nia asocia organo.

La Redakcio de „BE”

La 10-an de majo 1989 okazis solenaĵo omaĝe al la 70-a datreveno de nia elstara E-aganto, lektoro kaj akademiano Violin Oljanov. Ĉeestis S. Dâlbokov — prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio, reprezentantoj de sofiaj E-societoj, de Redakcio de gazeto „Paco”, kies ĉefredaktoro estas V. Oljanov, kaj multaj liaj samideanoj, kunagantoj, amikoj kaj gastoj. La celebron gvidis Canko Murgin.

Post la prelego pri lia vivo, agado kaj esperantista aktivado oni varme salutis la jubileanton.

Violin Canev Oljanov naskiĝis en Varna la 7-an de aprilo 1919 en familio de oficistoj, en kies medio formiĝis lia karaktero kaj mondkoncepto. En 1933, nur 14-jara, kiel lernanto en la klasika fako de knaba gimnazio en Varna, li komencis lerni Esperanton en vespera urba kurso, gvidata de konata esperantisto Petâr Pamporov. Post dek lecionoj la kurso ĉesis kaj poste Oljanov plu lernis ĉiam aŭtodidakte. Li perfektigis en la lingvo tre rapide kaj persiste. Pro komsomola aktivado la lernanto V. Oljanov estis eksigita de la gimnazio kaj de ĉiuj lernejoj de la reĝlando. Tiam li dediĉis ĉiujn siajn fortojn al la Esperanto-movado. Li ekagadis en la neŭtrala E-societo „Albatroso” en Varna kaj en 1935 partoprenis unuafoje nacian E-kongreson en sia naski-

ĝurbo kaj poste estiĝis sekretario de la komsomola grupo ĉe societo „Albatroso” kaj restis tia ĝis 1942. Unu el la ĉefaj taskoj estis aktivigi la junularon en la urbo, eduki ĝin je kontraŭfaŝisma pensmaniero kaj instrui al ĝi Esperanton. Fakte oni sukcesis tiurilate. Aliĝis tre multe da junuloj kaj komenciĝis tre vigla agado — kunvenoj, renkontiĝoj, amuzvesperoj, amasaj ekskursoj, ĥoro, konferencoj, renkontoj de eksterlandaj samideanoj k. a. La E-societo estiĝis centro de la kultura vivo en la urbo. Ĝis la 9-a de septembro 1944 Oljanov partoprenis ankaŭ naciajn E-kongresojn en Pazarĝik (1937), Sevlievo (1938) kaj Loveĉ (1940). En 1939 post la fino de la gimnazio aŭtune Oljanov komencis studi la Juran Fakultaton de Sofia Ŝtata Universitato.

Post la 9-a de septembro 1944 Oljanov fordonis ĉiujn siajn fortojn kaj entuziasmon por konfirmi la novan vivon en Varna — li okupis diversajn oficojn kaj agadis en la sociaj organizaĵoj, iniciatis reaktivigi la E-societon „Albatroso”. En 1948 li transloĝiĝis en Sofion. V. Oljanov partoprenis la kongresojn en Sofio (1945), Asenovgrad (1946), Plovdiv (1947). Dum la periodo 1948—49 li utiligis Esperanton en sia ĵurnalisma laboro en Bulgara Novaĵagentejo, tradukante propagandajn artikolojn en Esperanton.

Aŭtune 1949 li forveturis al USSR, kie

studis ĵurnalismen kaj rusan filologion en Leningrad kaj samtempe estis honorariata lektoro pri bulgara lingvo ĉe Bulgara Traduka Fakto en Leningrada Ŝtata Universitato. Reveninte Sofion en 1954, V. Oljanov partoprenis la iniciatan grupon por restarigo de Bulgara Esperantista Asocio. En la unua konferenco en Plovdiv li estis elektita ĝenerala sekretario de BEA kaj poste alterne estis ties vicprezidanto kaj sekretario (ĝis 1964), ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ (ĝis 1964). De 1958 ĝis 1964 Akomitatano de UEA, same nun — ekde 1977, delegito de UEA por Sofio — ekde 1963. Oljanov partoprenis ĉiujn E-kongresojn ĉe ni, kaj estis ĝenerala sekretario de LKK de la 48-a UK en Sofio (1963) kaj de la 63-a UK en Varna (1978). Ekde 1976 li estas ano de la Buroo de Centra Estraro de BEA. Krome li estas prezidanto de IUEF, prezidanto de la Filologia Sekcio ĉe BEA, prezidanto de Instrukomisiono.

En 1976 V. Oljanov estas elektita membro de la Sekretariato de MEM kaj ĉefredaktoro de gazeto „Paco“, kies tasko estas tre respondeca — unuigi ĉiujn kontraŭmilitajn E-fortojn en la batalo por paco.

V. Oljanov en majo 1986 estas elektita membro de Akademio de Esperanto. Li estas la kvara bulgara akademiano post: Ivan Krestanov, Atanas D. Atanasov (ADA) kaj prof. Stojan Ĝuĝev.

Oljanov estas ŝatata lektoro. Li gvidas multajn E-kursojn — landajn kaj internaciajn. Li estas aŭtoro de lernolibroj por la trigrada E-instruado, Esperanta gramatiko, Bulgara-Esperanta Vortaro (kunaŭtoro). Pro sia multjara kaj altnivela instrulaboro li estas titolita „elstara lektoro“.

Kiel ĵurnalisto Oljanov aperigis pli ol 1000 artikolojn, havas pli ol 200 verkojn rilate la Internacian Lingvon — pri Esperanto kaj en Esperanto. Pli ol 60 liajn artikolojn havas altnivelan sciencajn karakteron. Li estas kompilinto de la kolekto „Interlingvistiko kaj Esperantologio“ 1985, kiu inkluzivas artikolojn de 15 aŭtoroj.

Estas konate, ke V. Oljanov en siaj liberaj horoj verkas versaĵojn — li publikigis ĉirkaŭ 30 originalajn versaĵojn, tradukis poemojn kaj ankaŭ popolkantojn.

Pro sia senlaca multflanka, ofica, socia, organiza, instrua, scienca, antifaŝisma aktivado Violin Oljanov estas distingita per 4 ŝtataj ordenoj, 9 ŝtataj medaloj, 5 honoraj insignoj, el kiuj du internaciaj (de MEM kaj MPK). Li estas membro de la Asocio de Bulgaraj Ĵurnalistoj kaj de Asocio de Bulgaraj Sciencistoj.

En la parolo de S. Dâlbokov estis esprimita danko pri la multjara aktiva organiza kaj krea agado de V. Oljanov. Salutojn kaj bondezirojn al la jubileanto prezentis redakcio de gazeto „Paco“, Sofia E-societo „K. Penev“ kaj persone Tr. Milev, C. Ignev, C. Murgin kaj aliaj esperantistoj.

Violin Oljanov estas unu el la plej eminentaj bulgaraj esperantistoj, kiu tre multe kontribuis por altigo de la lingvo-nivelo de bulgaraj esperantistoj, unuigo de nia E-movado kaj por inda prezento de la bulgara kulturo eksterlande.

Ni bondeziras al nia veterano kaj amiko Violin Oljanov ankoraŭ multjaran fruktodonan kreadon, firman sanon kaj feliĉon!

Prof. d-ro Kiril POPOV

KIAM MI ESTIS ĈEFREDAKTORO...

LA RESTARIGO

Ĉiam la malfacilaj periodoj de la movado lasas karajn rememorojn vualitajn en romantiko. Tia estis la

poststagna tempo de 1954—1955. Mi ĵus revenis el mia kvinjara studado en Leningrado (USSR). Iun ta-

gon al mi telefonis la neforgesebla E-pioniro Asen Grigorov invitante min al sia hejmo por pridiskuti iujn

demandojn de la Esperanto-movado. Tien venis ankaŭ Minko Conkovski, Georgi Dolapčiev, Canko Murgin kaj Nikola Nikolov. Tiel kreiĝis la neformala iniciata komitato por restarigo de la E-movado, kiu en 1949 estis sufokita kaj fakte nuliĝita. Longaj estis la kunsidoj de nia komitato, viglaj — la diskutoj pri la formoj kaj la metodoj de agado, sed tiu estas alia temo, kiu atendas esploron kaj priskribon far niaj historiistoj. Grave estas, ke ni finfine (neniun demandante kaj sen ies ajn aprobo) restarigis la E-Asocion. Ni komencis eldonadi bultenon redaktatan de Asen Grigorov.

Post la unua poststagna kongreso en 1956 en Sofio la bulteno estis komisiita al mi, ĉar Grigorov komencis prepari la eldonadon de la fama revuo „Nuntempa Bulgario“. Min ĝenis la fakto, ke tuta asocio devas esti reprezentata de mizera bulteno kaj jam en la komenco de 1957 komencis pensi pri restarigo de nia ŝatata presorgano „Bulgara Esperantisto“, kvankam en la tiamaj kondiĉoj tio aspektis utopio. La estraro de BEA favore akceptis mian proponon kaj post la kvina numero de la Bulteno aperis „Bulgara Esperantisto“ n-ro 1, jarkolekto XXVI. Dum la jaro aperis 7 kajeroj, per kio ni montris la kontinuecon de nia organo, de kiu dum la jaro aperis ĉiuj 12 kajeroj. Per tiu restarigo de la nomo, kvankam la gazeto daŭre aperadis en stencilita formo, mi celis faciligi elpeton de papero kaj regula presado. Tion vere ni atingis kaj la sekvan jaron ni havis jam nian organon regule presita.

En la ĉefartikolo de n-ro 1 (1957) estas dirite: „Bulgara Esperantisto“ devas esti ĝvidanta forto de nia enlanda movado. Ĝi respegulos nian vivon, nian movadon, nian Esperantan kulturon. Kaj ni efektive konstatas, ke kiel en Bulteno, tiel same en „BE“ de 1957 dominas la organizaj materialoj, informoj pri fondiĝo de novaj societoj kaj societa vivo, pri kursoj kaj kulturaj aranĝoj. Regule la aktivuloj estas informataj pri marŝo de intersocieta konkurado, pri membroj kaj abonantoj — tiuj du ĉefaj indicoj pri aktiveco de E-organizo. Tamen estas prezentitaj ne nur tabeloj de la konkurado, ĉiam sekvas komentoj — laŭdoj, kritikoj, riproĉoj. Tiumaniere „BE“ sin prezentis kiel vera kolektiva organizanto, kio estis tre grava en tiu periodo, kiam BEA ne havis eblecon dungi salajratajn aŭ hono-

rariatajn funkciulojn. Entuziasmoj vizitadis societojn en la lando pagante la elspezojn el sia poŝo.

Mi ŝatus montri kelkajn ekzemplojn kiumaniere la redakcio per korespondadoj pri societa agado instigis al plivigliĝo, laŭdante la imitindajn elmontriĝojn de societoj kaj apartaj aktivuloj kaj kritikante la pasivecon. Sub komuna titolo „Ni sekvu ilian ekzemplon!“ (n-ro 5/1957) estas presitaj pluraj sciigoj pri agado, inter kiuj mi prezentas kvar:

● „La esperantista societo en urbo Goce Delčev, kiu agas sub la sperta gvidado de k-do B. Vălev, promesis pagi la membrokotizon de la societaj anoj por 1958 ĝis la fino de decembro 1957. Ĉu alilokaj societoj konkuris kun la gesamideanoj el urbo Goce Delčev?

● La esperantista societo en Nova Zagora jam pagis la membrokotizojn de 9 membroj por 1958. Estus tre bone, se la estraro de la societo klopodus pli insiste por plimultigo de la societaj membroj.

● Pagis la membrokotizojn por 1958 ankaŭ la esperantista societo „L. L. Zamenhof“ en urbo Orjaĥovo. Nia malnova samideano Georgi Stanev senlace laboras por nia afero. Funkcias kurso por komencantoj.

● Okaze de la 70-jara jubileo de Esperanto kaj 50 jaroj de BEA estis organizitaj 14 solenaj kunvenoj kun 850 partoprenantoj. Estis eldonitaj 898 afiŝoj, 1165 flugfolioj, 65 sloganoj, 13 murgazetoj. Oni organizis ankaŭ 37 radiodisaŭdigojn, 11 Esperantajn ekspoziciojn kaj 28 vitrinojn.

Ne sendis raportojn Vraca, Kârĝali, Levski, Lom, Stara Zagora, Jambol, Târgoviŝte, Dimitrovo k. a.”

Estis publikigitaj pluraj artikoloj (kaj ĉefartikoloj) je organizaj temoj, raportoĵoj k. a. Du estis la demandoj, kiuj ĉiam ĉeestis en la kolonoj de la gazeto: la nombro de la kotizintaj membroj kaj abonantoj. Instigaj grandliteraj sloganoj estas ofte renkonteblaj malsupre sur la paĝoj. Ĉio ĉi estis logika kaj natura reflektado de la reorganiza periodo de la movado post la sesjara stagno. Sed tio atestas ankaŭ, ke estis intima kunlaboro de la organiza fako kun la re-

dakcio, ke oni bone komprenis ne nur la propagandan, sed ankaŭ la organizan efikon de la presaĵoj.

Kompreneble la gazeto proponis ankaŭ varian materialon necesan por la vasta legantaro kun diversaj intereso. Marŝante antaŭen ni konstatas pligrandigon de la relativa pezo de tiu materialo, kiu faras la gazeton alloga kaj interesa: lingvaj demandoj, literaturaĵoj, recenzoj, anoncoj, metodikaj konsiloj, historiaĵoj, kantoj, humuraĵoj, internaciaj informoj, ilustra materialo kaj eĉ reklamoj. Jes, reklamoj estis necesaj, ĉar la gazeto memfinancis sin. Fakte, la memfinancado ne estis tiel malfacila problemo, ĉar dum la tuta tempo de mia ĉefredaktoreco (1957—1964, sen 1961) la redakcio pagis nek salajrojn, nek honorarion. Tiu ĉi fakto certe reflektis al la kvalito, ĉar oni ne povas elekti la plej bonajn inter kvalifikitaj aŭtoroj, sed la kondiĉoj estis tiaj. Oni devus konsideri tiujn gravajn cirkonstancojn, pritaksante la gazeton en tiu periodo.

Mi ŝuldas dankon al ĉiuj idealismaj kunlaborintoj, kaj precipe al la membroj de la redakta komitato. Tiuj en la plej malfacila, organiza periodo estis Kiril Drajev kaj Trajana Petkova. En 1958 formiĝis Redakta Komitato el unuj el la plej elstaraj esperantistoj: Ivan Sarafov, Stefka Hristova, Stefan Kiraĝiev kaj Stefan Masárov. En 1959 (n-ro 6) aldoniĝis Simeon Simeonov. Stefka Hristova ankaŭ korektis la gazeton (same senpage). En 1962 la Redakta Komitato estis reorganizita: Kiril Drajev, Atanas Lakov, Canko Murgin (vicĉefredaktoro), Ivan Sarafov, Simeon Simeonov. Mi ne devas forgesi entuziasman junulinon, sekretarion de la junulara sekcio Delka Ĉolakova, kiu regule helpis min en la redakcia laboro, kaj precipe en la paĝaranĝo de la kajeroj.

Grava faktoro en la relative senproblema redaktado estis la libero, kiun disponis la Redakta Komitato, precipe en la unuaj jaroj de mia sepjara redaktado de „BE“. Ni ĉiam memoru, ke la libera aktivado de la homoj prezentas la plej solidan garantion por bonaj rezultoj. Tio aparte validas por la ĵurnalistoj.

Al la junaj heredantoj de nia nobla afero mi deziras ekskluzivajn sukcesojn!

Violin OLJANOV



LA TILIOJ

*Vespera hor', vespera hor' —
vi dronas en nebuloj,
kaj larm' post larm' sin rulas for
de miaj la okuloj.*

*Foriras suno, sed reven'
tre baldaŭ estos, ho animo!
kaj tag' post tag' forpasas jen
trankvile al senlimo.*

*Tilioj flustras dum vesper'
en la ale' senhoma,
kaj flor' post flor' al trema ter'
ekfalas belaroma...*

*Tilioj, mi ne vidos vin
post jaro kiam floros!
En jar' post jar' la amikin'
sur tomb' amika ploros.*

MITI

(pseŭdonimo de Dimităr Zlatarski)
(El „Bulgara Esperantisto“, n-ro 4/1923)

LA VERDA KARAVANO

*Vigle marŝas nia verda karavano
Tra malico kaj kruel'!
Tra minaca kaj malluma oceano
Marŝas pacaj batalantoj, man' je mano,
Firme marŝas al la sankta cel'...*

*Jen aperas pli kaj pli fortikaj baroj,
Barikad' post barikad',
Kaj post ili nin minacas la barbaroj,
Kaj post ili mokas lupiĝintaj aroj,
Mokas pri la paca batalad'!..*

*Jen subite sur la longa voj' perdiĝas
lu kara samcelan';
Iras plu la karavan', ne devojiĝas,
Ĉar al ĝi pli novaj fortoj tuj aliĝas —
Venas batalant' post batalant'!*

*Vigle marŝas nia verda karavano
Tra malico kaj kruel'!
Tra minaca kaj malluma oceano
Marŝas verdaj batalantoj, man' en mano,
Firme marŝas al la sankta cel'!..*

RINMA

(pseŭdonimo de Marin Bălgarenski)
(El „Bulgara Esperantisto“, n-ro 1/1937)

NE PLU CEDI!

Ĉu falos mi rezigne kaj sen lukto?
ĉu mia kredo, agoj, idealo,
ĉu vivo mia — restos do sen frukto?
Ne! — tamen — ili estos ja realo!

Mi kredas je l' estont' per kredo forta,
je ĉi estont' ne povas mi ne kredi!
Premite de la zorgo kaj de l' sorto,
decidas tamen mi: ne cedi, ne plu cedi!

Mi ĵetis mian liron melodian
kaj diris: mi ĉesigas mian kanton!
Riproĉis mi la mondon apatian,
en fajron ĵetis mian revon sanktan.

Kaj longe ploris mi je mia sorto,
konsolon trovis nur en larma plendo.
Mi revis mian finon, kaj pri l' morto
mi jam meditis en amara sento...

Petro JORDANOV

(El „Bulgara Esperantisto“, n-ro 9—10/1937)

MIA KANTO

Mi ne kantos pri steloj, pri amo kaj rozoj,
kun mistera, tenera amar' —
ja ni vivas tempeste en temp' grandioza —
mi trompetos per kupra fanfar'!

Nun — la korsentimentoj formortas velkante
en la tagoj de sanga batal'.
Mi galopas antaŭen kaj vokas flamkante
kaj alarmas per fajra signal'.

Mi forgesas prikanti la mildajn animojn,
kaj sopiri kaj plori per larm'...

mia kanto funebras la karajn viktimojn
sed samtempe tamburas: **alarm'!**

O, ni estas milmiloj kaj niaj armiloj
ne nur estas el ŝtalo kaj fer' —
ni batalas per glavoj ankoraŭ pli brilaj:
per justeco, per lumo kaj ver'!

Kaj en tiu ĉi tempo unike majesta
mia kant' estas kupra fanfar',
kiu vekas kaj vokas per voĉo tempesta:
Al batalo, vi, granda homar'!
Sofia, novembro 1941 j.

M. L.

(pseŭdonimo de Asen Grigorov)

(El „Bulgara Esperantisto“, n-ro 9—10/1941)

RESPONDO

Leteron vian, ho amiko fora,
ricevis mi kaj sentis mi la ploron
de via kor' amanta, sed ĉagrena
pro l' negra vivo peza, zorgoplena.

Malsana kuŝas nun patriĥo via,
ne teksas plu ŝi, kaj la sunradioj
ne tuŝas lacan korpon, kaj facila vento
ŝin ne karesas per amika sento.

Ne scias mi, ĉu povus ŝin kuraci
prizorgo via, via pen' senlaca,

kaj ĉu kunsento mia malproksima
ĝojigos ŝin trans maroj kaj landlimoj.

Sed vi, amiko, nun ne malesperu:
la lukto sankta por justec', libero,
kunigas ĉiujn nigrajn filojn flame,
ĉar ili jugon ne toleras same.

Akceptu korsalutojn, kara frato,
kaj sciu vi: en mia land' amata
egale vivas ĉiuj homoj ĝoje,
ĉar ili marŝas socialisman vojon.

Sinka FILARETOVA

(El „Bulgara Esperantisto“, n-ro 1/1983)

MARIA

RAKONTO

— Saŝo, la homoj similas riverojn, ĉu ne? — demandis min Maria, observante la preterpasantan montaran rivereton. Ŝi silentis momenton kaj daŭrigis: — Nu, aŭskultu, kiel dolĉe murmuras la akvo, kvazaŭ rakontas fabelon.

Mi ĵetis rapidan rigardon al la rivereto, vige saltanta de ŝtono al ŝtono, formante dekojn da etaj akvofaloj. Sed mi ne respondis tuj. Ŝajnis al mi, ke Maria fantazias, ke ŝia komparo estas stranga kaj neperceptebla. Tamen ne volante kontraŭstari ŝin, mi flustris:

— Jes, kara, la homoj similas riverojn.

Kiam la vesperon mi enlitiĝis, la impresoj de la belega ekskurso longe okupis mian atenton. Maria, mia revo, estis tiel milda kaj babilema kun mi! Malgraŭ tio, mi ankoraŭ dubis, ĉu ŝi vere amas min. Poste la penso pri la riveroj ree aperis antaŭ mi. Mi komencis riproĉi min, ke hodiaŭ mi ne estis sincera, ke nur pro komplezo mi respondis: „Jes, Maria, la homoj similas riverojn”. Kia simileco fakte povus ekzisti inter ili?

Kun Maria mi interkonatiĝis antaŭ ses monatoj. Ni vagis kune en la montaroj, vizitadis teatrojn, koncertojn, amuzvesperojn, sed fakte mi ankoraŭ ne konas ŝin bone. Mi komprenis nur, ke ŝi estas mirinda estaĵo. Ŝi ŝatis muzikon, poezion, pentroarton, serĉis kaj ĝuis la belecon tie, kie ni ordinare ne rimarkas ĝin. Tiu ĉi virino, juna kaj bonkora, estis elkreskinta en montara urbeto. La daŭra kontakto kun la naturo donis al ŝi tre senteman animon. Ofte ŝi ascendis montopintojn kaj de ili renkontis la sunon. Pro tio oni nomis ŝin aglino. Ŝi ŝatis la florojn, la bestojn, la infanojn. Kaptinte kokcinelon, ŝi ĝuis ĝiajn nigrajn makuletojn kaj kiam satiĝis, lasis ĝin flugi for kun bondeziroj. En ŝia animo estis io primi-

tiva kaj alloga. En kiu senco ŝi povus pravi pri la riveroj?

La morgaŭan tagon mi telefonis al Maria kaj ni interkonsentis pri rendevuo.

— Ĉu ni iros danci ĉi-vespere? — ŝi demandis ĉe la renkonto.

— Ne, Maria, ĉi-vespere ni filozofios. Mi deziras, ke vi klarigu al mi vian komparon pri la riveroj — mi respondis, kiam ni sidiĝis sur benko en la parko.

— Bone, mi ankaŭ ŝatas la filozofiajn temojn — konsentis tuj Maria.

Poste, preninte mian manon, ŝi eksilentis, kvazaŭ volis koncentri sian atenton, kaj komencis.

— Unue, Saŝo, mi parolos pri la naturo, pri ĝia beleco, harmonio, dinamiko, ritmo. Tiel vi komprenos min pli facile. La okuloj, la animo kaj la konscio de la homoj perceptas la belecon ĉie. La najtingalaj triloj ĝojigas nin, la ĉielarko karesas nian estetikan senton, la belaj, ofte mirindaj formoj de floroj aŭ bestoj igas nin admiri kaj interjekcii. Ĉu la pufiĝanta pavo konscias la belecon de siaj imponaj plumoj aŭ la skarlataj kaj violbluaj koraloj, marsteloj kaj strikoloraj fiŝoj scias, kian emocion ili naskos en la animo de la subakvaj esplorantoj?

Ni diru, ke vi estas kolektanto de papilioj. Kio igis vin kolekti ĝuste papiliojn? Sendube, via intima ideo estis ĝui ilian belecon, ĝui la malavare disĵetitajn diversformajn, molajn, pitoreskajn kolormakulojn. Ĉu vi ne konsentus kun mi, ke la reto de la araneo

estas same delikata belaĵo? Mi ne dubas, ke dum frostaj vintraj frumatenoj vi ofte ĝuis la glaciflorojn mistere aperintajn sur viaj fenestrovitroj.

Ne volante interrompi ŝiajn pensojn, mi silentis. Mia menso soife ensorbis ĉiun vorton. Kion mi povus kontraŭdiri? Maria daŭrigis.

— Vasta kaj ampleksa estas la diapazono de la naturbeleco. La kuracistoj longe espoloris la homan korpon kaj admiris tiun mirindan maŝinon. Ne, mi ne rajtas diri maŝinon. Ĉu la belstatura torso de Venusa de Milo aŭ de similaj belegaj virinoj estas maŝino?! La homa korpo estas vera belaĵo kaj mirindaĵo.

Sed la naturbeleco konsistas ne nur el koloroj kaj formoj. Ĝia karakteriza indiko estas ankaŭ la dinamiko. Tiun dinamikon oni sentas en la akvofaloj kun la miliardoj da vaporigantaj akvogutoj, en la senĉese vagantaj nuboj, en la ŝtormoj kaj fulmotondroj, en la erupcioj de la vulkanoj, en la maturiĝo de la vino, en la atako de la mikroboj. La ventoj blovas, la steloj cirkulas, la atomoj bolas. Ĉie estas dinamiko. Sen ĝi ekregus morto.

— Rakontu ion pri la harmonio, Maria mi interrompis ŝin.

Tute fascinite, ĉi-vespere mi sentis, kiel pli kaj pli Maria kreskas spirite antaŭ miaj okuloj. Same verve kaj emociplene ŝi daŭrigis:

— Observante la naturvicon, oni facile konstatas, ke en ĝiaj aĵoj ekzistas ankaŭ harmonio. Nokte ni observas la stelojn senkolizie flugantaj en la kosmo; haltinte antaŭ la formikejo, mi rigardas, kiel, ne malhelpante unu la alian, la formikoj laboras laŭ nesribitaj leĝoj. La kristaloj kristaliĝas bele kaj simetrie, la abeloj arkitektmajstre konstruas sian ĉelaron, ĉiu muzik-



Grafikaĵo: Penka PETKOVA

noto havas sian ĝuste difinitan lokon en la diversaj gamoj, melodioj kaj akordoj. Leĝoj, naturaj leĝoj, simplaj kaj saĝaj.

Kaj la ritmo? La ventoj, kreitaj pro la influo de la suno sur la tero, la tajdo, kiu altiĝas kaj malaltiĝas sub la influo de la luno, la tagoj, sekvataj de la noktoj — ĉiuj ĉi estas subigitaj al la leĝo de la ritmo. Ritmo estas en la poezio, ritmo estas en la muziko, ritme sin movas la pendolo, ritme spiras ni ĉiuj. En nia ĉiutaga vivo ni ĉiam devas kompari nin kun la naturo, ĉar ni estas eroj de ĝi. Ĉiu homo devas porti en si la belecon, la dinamikon, la harmonion kaj la ritmon de la naturo.

— Belege, belege! — mi interjekciis. En la sama tempo mi pensis: „Ĉu tiu ĉi virino kun simila tenera animo estas tiu sama inĝenierino, kiu kaptas kaj bridas riverojn en baraĵoj, estras laboristojn kaj sentas sin egalrajta kaj egalpova kun la viroj?“

— Tamen ĉu vi kredas, ke la civilizacio tiom multe progresis, por ke ni povu diri, ke inter la homoj regas harmonio? Ne! Ankoraŭ milionoj da homoj sur nia terglobo vivas en malklereco kaj mizero, mortas pro malsato kaj pro teruraj malsanoj. Aliflanke, la homaro malproksimiĝis sufiĉe multe de la naturo, kaj pro tiu sia peko ricevas punon en formo de degenero kaj anticipa morto.

— Sed, Maria, la naturleĝoj ne estas la samaj, kiuj regas en la homa socio — mi diris.

— Oni ja ne povas ĝuste imiti la naturleĝojn, sed oni povas efektive krei kondiĉojn egale necesaj por ĉiuj homoj, por ke ili vivu laŭnature kaj feliĉe.

Senpacience mi atendis la momenton, kiam ŝi komencos klarigi sian originalan penson pri la riveroj. Post eta paŭzo ŝi komencis:

— Mia hieraŭa eldiro pri la riveroj estas bazita sur la sama koncepto. Nia vivo, Saŝo, estas multjara vojaĝo. Vojaĝo simila al la vojaĝo de la riveroj, trankvila aŭ plena de dinamiko, utila aŭ senkolora, vana. Tiu-rilate ĉiu homa vivo estas unu rivero. Ekzistas homoj senvolaj kaj apatiaj, kiuj similas trankvilajn riverojn, kun kanoj kaj akvolilioj. Ofte kelkaj arbotrunkoj estas falintaj en ilia akvo, tamen tiuj riveroj ne protestas, ne forpuŝas kaj ne forportas la trunkojn, sed rezigne kaj kviete preterfluas ilin. Aliaj homoj, en kiuj regas pasioj kaj malvirtoj, similas riverojn, kiuj eliĝas el siaj litoj, detruas bordojn, domojn, mortigas bestojn, faras sulkojn sur la ebenoj. Ĉu la sulkoj sub la okuloj kaj ĉe la anguloj de la lipoj kaj en la animo mem ne estas ofte rezultoj de furiozintaj pasioj kaj malvirtoj? Ekzistas ankaŭ homoj similantaj nek la detruantajn riverojn, nek la kvietajn. Ili estas entuziasmoplenaj, viglaj, iliaj sentoj kaj intelekto kontrolas sin reciproke. Ili sentas en si la kanton de la vivo, kanton de la naturo. Ili alportas ĝojon, plezuron, feliĉon. Ili similas printempajn torentojn... La riveroj trafluas montojn kaj kampojn, batalas kontraŭ rokoj, akceptas dekojn da riverbranĉoj kaj fine enfluas marojn kaj oceanojn. Ilia akvo, komencinta sian vojon de la fonto, ne ekzistas plu. Ĝin sekvas nova. En sia vivo la homoj laboras, batalas, ĝojas, amas kaj malamas, kaj lacaj kaj maljunaj atingas la morton.

Mi ĉirkaŭprenis ŝin kaj arde kisis ŝin. Ŝi ne protestis. Estis jam malfrue. Tiu vespero kunigis nin por ĉiam kaj ni ekfluis kiel du riveroj al la oceano.

Mihail ŜEKERĜIEV

Noto de la Redakcio: La rakonto „Maria“ gajnis la III premion en la Literatura Konkurso de la 53-a UK de Esperanto en Madrid (1968)

(El „Bulgara Esperantisto“, n-ro 6 1969)



KUNLABORO — GRAVA KAJ NECESA

La junulara kunlaboro estis centro de la problemaro, kiu venigis pli ol 40 personojn al la Internacia Junulara Esperanto-Seminario (30.03—04.04.1989) en Bad Saarow. Partoprenis reprezentantoj de Bulgara Esperanto-Junularo, Hungara Esperanto-Junularo, Pola Esperanto-Junularo, Pola Studenta Esperanto-Komitato kaj de la Junularaj sekcioj de AESSR, ĈEA kaj GDREA.

La organizantoj lasis la unuan posttagmezon libera, por ke la gastoj ĝuu la ĉarman ĉirkaŭaĵon — ja la gastodomo „Eibenhof“ troviĝas sur mirinde bela duoninsulo en arbariĉa regiono. Tio estis preskaŭ ŝola ebleco por migrado kaj pigrado, ĉar poste la programo evidentiĝis eĉ pli alloga ol la naturo.

Jam la unuan tegon estis prezentitaj koncize la koncernaj junularaj organizoj, iliaj specifajoj, sukcesoj kaj problemoj. Oni ankaŭ uzis la eblecon diskonigi siajn aranĝojn kaj varbi por ili.

Dum la seminario abundis prelegoj de fakuloj el GDR. D-ro Detlev Blanke faris du enkondukajn prelegojn pri la tutmonda E-movado. Michael Behr menciis kelkajn sciindaĵojn pri la apliko de Esperanto en

scienco kaj tekniko. Hans-Peter Bartos skizis iujn esencajn problemojn de la publika agado pri kaj por Esperanto. (Cetere, tiu ĉi prelego multe pli utilus, se ĝi aperus presforme.) Fritz Wollenberg prelegis kaj projekciis lumbildojn pri L. L. Zamenhof. Manfred Arnold parolis pri Esperanto-poezio. Torsten Bendias diskutigis pri TEJO. Ankaŭ la gastoj kontribuis: Grazyna Mirkiewicz kaptis la atenton de la diligenta kaj kunludema publiko per amuzaj lingvaj ekzercoj.

Dum la lasta antaŭtagmezo funkciis du laborgrupoj: pri la projekto DLT (Distribuita Lingvo-Tradukado) sub la gvido de Bert Schumann kaj pri moderna pasigo de la libertempo sub la gvido de Gerd Lutter.

Plurfoje, en diversaj prelegoj kaj diskutoj oni emfazis kelkajn gravajn problemojn. Temis pri kunlaboro inter junularaj organizoj, reciproka informado, sendeviza persontaga interŝanĝo, k. a. Oni ankaŭ atentigis, ke nepre endas forigi la diletantecon kaj plialtigi la nivelon de la E-aranĝoj.

Preskaŭ ĉiujn menciitajn problemojn oni tuŝis ankaŭ dum la vespera diskuto pri la planata Esperanto-Centro en Bjalistok, kiu estos la plej

granda en la mondo, se la projekto sukcesos. Ĉiu junulo povas kontribui al la realigo de tiu ideo, partoprenante laborbrigadon en Bjalistok ĉi-jare kaj estonte.

La aliaj vesperaj aranĝoj celis antaŭ ĉio distri kaj refreŝigi la ĉeestantojn. Post la ĉiutagaj viglaj diskutoj ni amuziĝis kaj ripozis dum la lumbildprelegoj aŭ dum la kantado kaj gitarludado.

Eble la plej gaja parto de la Seminario estis la oratora konkurso. Kaj la konkurantoj, kaj la ĵurio brilis. La unuan premion gajnis Jaroslaw Miklacz (Pollando), kvankam ne nur li plenumis la postulojn pri originaleco, spriteco, alta lingva nivelo, kontakto kun la publiko ktp.

Dank' al la klopodoj de la organizantoj la programo estis ne nur riĉa, sed ankaŭ tre varia — streĉa kaj distra samtempe. Mi kredas, ke ne nur mi spertiĝis dum tiu seminario, ke ne nur mi ekhavis novajn ideojn kaj instigojn pri la solvo de diversaj problemoj. Unu ideon mi volonte donacas: Se iam oni invitos vin al junulara seminario en Bad Saarow, ne hezitu! Tuj aliĝu!

Mariana EVLOGIEVA

SEMINARIO EN MINSK

Minsk, la ĉefurbo de Belorusio, gastigis inter la 29-a de marto kaj 5-a de aprilo k. j. la 2-an Internacian Esperantistan Junularan Renkontiĝon en USSR. Ĝi allogis pli ol 250 gesamideanojn el ĉiuj partoj de Sovet-Unio kaj gastojn el Britio, Bulgario, Finnlando, FRG, GDR, Honkongo, Hungario, Okcidenta Berlino, Pollando, Svislando kaj Usono.

La programo inkluzivis junularan universitaton, enkadre de kiu estis prezentitaj interesaj prelegoj, forumon pri Sovet-Unio, dum kiu oni diskutis pri la renovigo en la lando kaj pri ĝia influo al la rilatoj inter la ŝtatoj kaj homoj, artajn vesperojn kun profesiaj kaj amatoraj plenumantoj. La partoprenantoj ekskursis al la historia vilaĝo Hatinj.

En la kioskoj oni povis aĉeti malnovajn librojn kaj diversajn aliajn esperantaĵojn.

Telegrafa Agentejo de Sovet-Unio (TASS), Sovetia Televido kaj la gazetaro informis pri la aranĝo.

Sendube la 2-a Internacia Esperantista Junulara Renkontiĝo stimulas la esperantistan vivon en Belorusio.

L. ALEKSANDROV

INFORMAJ ARANĜOJ EN TULUZO

● De la 13-a ĝis la 15-a de januaro okazis la Studenta Salono en la ekspozicejo de Tuluzo. La esperantistoj informis pri la universala lingvo en la stando de Radio-FMR, kiu elsendas Esperanto-programon.

● De la 28-a de februaro ĝis la 3-a de marto 1989 okazis Esperanto-ekspozicio kaj prelegoj en la Universitato de Tuluzo le Mirail (Miraj), beletra kaj psikologia universitato.

La 28-an de februaro prelegis Michel Duc Goninaz, instruanto pri Esperanto kaj rusa lingvoj en la Universitato de Aix-en-Provence, direktoro de la Sekcio pri gramatiko de la Akademio de Esperanto. La temo de la prelego estis: „La planitaj lingvoj, ekzemple Esperanto“.

La 1-an de marto prelegis Pierre Janton, profesoro pri Esperanto kaj angla lingvoj en la Universitato de Clermont-Ferrand. La prelego havis temon „Esperanto je la servo de Eŭropa identeco“.

MALTRANKVILO

Teksto: Vesa Maleva
Tradukis: Nikola Pilev

Muziko: Nikolai Dobrinov

lar es-mi-a fir-ma-
ma tas

ment pri l'pe-re-in-ta en flugad'bir- da-ro sen

fes-ti la ver-de-con de l'prin-temp' kaj sen a-

tin-gi si-ajn nestojn ar-ba-ro. A-lar-ma es-tas mi-a tag' sur

*Alarma estas mia firmament'
pri l' pereinta en flugad' birdaro
sen festi la verdecon de l' printemp'
kaj sen atingi siajn nestojn en arbaro.*

ter' pri vi, pri la in-fa- na kri' pri l'

ve-roj, ki-nj vi-vas sen li-ber', pri la so-nan-ta me-lo-di' en

mi.

a t-po A- ma- rajn kan-tojn de ni de- di- ĉos al

Refreno: *Alarma estas mia tag' sur ter'
pri vi, pri la infana kri'
pri l' veroj, kiuj vivas sen liber',
pri la sonanta melodi' en mi.*

la es- tin- taj Hi-ro- ŝi- moĵ plu- raj. Mi

sci- as, ni- aj for-toj ja su- fi- ĉas per- ko- re

Refreno:
fa- ri ne- rom- pe- blajn mu- rojn. Ho-

ma- ro, per- la fort' de re- voj ni- aj ĉu

Refreno: *Homaro, per la fort' de revoj niaj
ĉu povos esti vi savita nun
ke blue, verde tiu mond' radiu
sub brilo karesanta de la sun'.*

KRONIKO DE LA BUROO DE CE DE BEA

En sia kunsido la 3-an de majo k. j. la Buroo de CE de BEA aprobis Fondon de firmao „Esperanto-turist” kun havaĵo, disponigita de BEA, kaj havanta sidejon en Sofio surbaze de art. 11, al. 1 kaj 3, p. 1 „e” de Dekreto № 56 pri la Ekonomia Agado de Ŝtata Konsilantaro. Objekto de agado de la nova firmao estas: organizo de en- kaj eksterlanda turismo por esperantistoj kaj amikoj de Esperanto, mastrumo de propra kaj luita turisma bazo kun tuteca turisma priservo, organizo de enlandaj kaj aliaj aranĝoj pere de senvaluta interŝanĝo kaj ligita kun tio esplora, transporta, peranta, reklama, impresaria k. a. agado.

Estis elektita Gvidkonsilantaro de la firmao „Esperanto-turist” en jena konsisto: Cvetka Miteva (prezidanto), Maria Toleva, Vasil Vladimirov, Petâr Panov, Stanko Stankov — Varna, Nikola Petrov — Burgas, kaj Stojĉo Cankov — Ruse. Oni determinis Veronika Mikaeljan, ĉefkontistino de CE de BEA, kiel kontroliston de la novefondita firmao.

Oni akceptis Statuton de la firmao „Esperanto-turist” kaj ties laborplanon por 1989. Kiel provizoran gvidantaron de „Esperanto-turist” oni enoficigis Maria Toleva, eksa direktorino de IEK — Pisanica.

En la sama kunsido de la Buroo de CE de BEA estis akceptita Regularo de la Unuigita Redakcio de BEA. Oni establis Redaktan Komitaton pri la neperiodaj eldonaĵoj ĉe la Unuigita Redakcio de BEA en konsisto: Kunĉo Vâlev, Aleksandâr Dunĉev, Venelin Mitev, Violin Oljanov, Maria Jankova, Mariana Evlogieva kaj du reprezentantoj de Komisiono pri Organiza Agado.

Estis establita ankaŭ Redakta Komitato pri propagandaj reklamaj materialoj ĉe Komisiono pri Kultura Agado kun respondeculo Ivan Ĉulev kaj kvar membroj elektataj fare de la Komisiono pri Kultura Agado.

Oni fondis Artan Konsilantaron ĉe la Komisiono pri Kultura Agado, kiu okupiĝos pri plibonigo de la kvalito de la eldonaĵoj kaj propagandaj-reklamaj materialoj de BEA kaj pri pli efika kaj rezultodona respegulo de la agado de bulgaraj esperantistoj en la amaskomunikiloj — radio, televido kaj centra gazetaro. La Arta Konsilantaro konsistas el: Nikola Aleksiev, Nano Kjuĉukov, Kunĉo Vâlev, Violin Oljanov, Venelin Mitev, Dimitâr Papazov, Aleksandâr Dunĉev, prof. Kiril Popov, Maria Jankova, Georgi Miĥalkov, Dimitâr Ĥaĝiev, Donĉo Ĥitrov, Nikola Pilev, Petko Arnaudov kaj Ljubomir Trifonĉovski.

E. G.

JUBILEA KONCERTO



La 23-an de marto k. j. en Halo 11-a de Popola Kulturpalaco, la Ĥoro de sofiaj esperantistoj festis sian 10-jaran jubileon. La solena koncerto estis vera evento por ĉiuj ĉeestantoj en la salono.

La jubilean koncerton malfermis Sava Dâlbokov — prezidanto de BEA, kiu emfazis la gravan rolon de la Ĥoro por la esperantista movado en nia lando. Koncize oni rakontis pri la historio de la Ĥoro; pri la merito de ĝiaj fondintoj — Zora Oŝanska kaj Borislav Petkov, de ĝia unua ĥorestro, Dimitâr Terziev. Estis premiitaj per la ĥonora insigno de BEA multjaraj ĥoranoj kaj E-aktivuloj.

Dum 10 jaroj la Ĥoro prezentis koncertojn antaŭ esperantistoj el la tuta mondo, partoprenis la malfermon de la 63-a UK, koncertis dum la kongresoj en Antverpeno kaj Budapeŝto, aktive partoprenis naciajn renkontiĝojn kaj aranĝojn. Nun la artgvidado estas en solidaj manoj de: Katja Vuĉkova — ĥorestrino, Liljana Panajotova — pianistino akompanistino, Emilija Andonova — voĉpedagogino kaj solistino. La Ĥoro estas honorita per arĝenta medalo en VI Nacia Festivalo de Amatora Artaktivado kaj per ora insigno kun laŭreata titolo en VII Nacia Festivalo — grava atestilo pri ĝia supreniro.

La 23-an de marto la Ĥoro nin ĝojigis per bona ĉiurilate arta programo, kiu markis la kreaĵn sukcesojn kaj perspektivojn de la tuta kolĉektivo. Estis plenumitaj kantoj laŭ nemortantaj vortoj de L. L. Zamenhof — „La espero”, „La vojo”, „Ho, mia kor”. La ĥoro sonas kompakte, oni kaptas la sisteman laboron rilate vokalon, tembron, tononuancon kaj kantecon de ĉiu aparta partio flanke de la voĉpedagogo kaj ĥorestro. Tio ĉi estas solida bazo, sur kiu plue oni batalos por

arta precizeco kaj perfekteco. Tio certe baldaŭ okazos, ĉar la ĥorestrino, la pianistino, kaj la ĝesolistoj Emilija Andonova, Dimităr Mateev kaj doc. d-ro Cvetan Kar-dašev pruvis sian kapablon kunduki la horarton al prestiĝa supro. Kompreneble, tio ne povus efektiviĝi, se daŭros la misproporcio inter la virina kaj la vira partoj rilate nombron kaj kvaliton. Estas necese altiri pliajn virojn por ke estiĝu egalvaloro de komuna belsoneco. Sed la nuna ĥorestraro estas garantiaĵo por estontaj artsukcesoj de la kantokolektivo.

Bonŝancon, jubileuloj!

Dora ĤRISTOVA,
kandidato de artscienco

NACIA KONKURSO-RECITALO DE POEZIO DE PENJO PENEV

Komence de majo ĉi-jare la urbo de juneco Dimitrovgrad akceptis duafoje la esperantistojn, ŝatan-tojn de la poezio de Penjo Penev — „la poeto en la vatjako“. Li estis veninta tien ĉi rekte el la gimnazio, kiam la urbo ankoraŭ ne estis, sed devis ekesti laŭ la volo de la libera popolo post la venko super faŝismo. La naskiĝvilaĝo de Penjo — Dobromirka — restis for, trans la blua Balkano, sed li mem, poetokonstruisto, restis por ĉiam tie ĉi, en la grundo de tiu urbomonu-mento al la plej kara gvidanto kaj instruanto de nia popolo Georgi Dimitrov. La fakto, ke Penjo estis espe-rantisto, igis lian personecon aparte amata por la bul-gara esperantistaro.

La malfermon de la recitalo faris la prezidanto de la Organiza Komitato Petro Sirakov — sekretario de la Komisiono pri Spirita Evoluo en la urbo. Li bonvenigis la gastojn kaj bondeziris sukceson al la partoprenan-toj.

Ĉirkaŭ 130 ĝesperantistoj, precipe lernejoj, ape-ris unu post alia sur al scenejo en la Domo de Kultura-gantoj per individuaj kaj kolektivaj plenumoj kun fla-maj Penev-versoj enbuŝe.

Post la konkursa programo la prezidanto de la ĵurio Kunĉo Vălev, prezidanto de Centra Esperanta Kulturdomo-Sofio, anoncis la aljuĝojn de premioj al la plej bone prezentintaj sin. Oni enmanigis multajn premiojn — monajn kaj objektajn, disponigitajn mala-vare al la Organiza Komitato fare de diversaj organiza-joj kaj entreprenoj.

La gastoj de la urbo kun vigla intereso trarigardis la Muzeon de Penjo Penev kaj poste metis florkronojn antaŭ la monumento de Georgi Dimitrov — la patrono de la loka E-societo, antaŭ la monumento de d-ro L. L. Zamenhof kaj antaŭ la monumento de la ama-ta poeto, staranta en belega samnoma parko. Ĉi tie ili kun granda intereso aŭskultis rememorojn pri P. Pe-nev, rakontitajn de K. Vălev — lia samvilaĝano kaj unu el liaj unuaj instruantoj en la frua juneco.

Ĉiuj partoprenantoj en la recitalo admiris la bone-gan organizon de la aranĝo — frukto de kelkmonata penado de la societa estraro ĉekape kun la prezidanto Tonĉo Kumanov kaj la sekretario Geno Viĉkov kaj ĝia multnombra kaj unueca aktivularo. Apartan dankon ĉiuj esprimis al P. Sirakov, kiu la tutan tagon pasigis inter la esperantistoj.

K. KARAVELOV

PREMIOJ

I. RECITADO

A. Ĝelernantoj ĝis la oka klaso

Individuaj

distinguloj

Nikolaj Ĥaralanov el Dimitrovgrad
Tanja Stojanova — Gabrovo
Marija Donĉeva — Gabrovo
Daniela Ilieva — Antonovo, depart. de Razgrad
Denica Nikolova — Stara Zagora
Rumjana Naskova — Dimitrovgrad

bone prezentintaj sin

Vanja Tenĉeva — Dimitrovgrad
Diana Georgieva — Dimitrovgrad
Milena Ivanova — Dimitrovgrad

Kolektivaj

bone prezentintaj sin

junpionira grupo el Gabrovo, gvidanto Stefka Toteva

B. Mezlernejoj kaj civitanoj

Individuaj

superuloj

Ĥristina Nikolova el Pazarĝik
Tanja Petkova el Ĥaskovo

distinguloj

Daniela Krăsteva el Stara Zagora
Stojanka Dimova el Ĥaskovo
Ginka Ivanova — Dimitrovgrad
Sija Rajkova — Stara Zagora

bone prezentintaj sin

Dimitriĉka Ĉarâkova el Ĥaskovo.

Kolektivoj (mezlernejanaj)

superuloj

grupo el u. Ĉepelare kun gvidanto Nikolina Takova

distinguloj

grupo ĉe E-societo „G. Dimitrov“ en Dimitrovgrad
kun gvidanto Slavka Boteva

bone prezentintaj sin

2 grupoj el lernejo „V. Levski“ en Dimitrovgrad kun
gvidanto Jana Krăsteva

II. MUZIKO

distinguloj

Albena Sankova — mezlernejanino el Dimitrovgrad

bone prezentintaj sin

grupo de mezlernejoj el Jambol kun gvidanto Lili
Paraŝkevoja

RENKONTIĜO „SIRINGA VESPERO '89"

Ankaŭ ĉi-jare la tradicia, 9-a Esperantista Renkontiĝo „Siringa Vespero" en Loveĉ altiris multe da esperantistoj el ĉiuj anguloj de la lando. Pli ol 130 gastoj venis por konatiĝi pli proksime kun la fama ĉefurbo de la Apostolo de Libereco, vidi ĝin brile renovigita kaj bonkonstruita dum la jaroj de la popola regpotenco, posedanta siaspecan neripeteblan ĉarmon, ĝui la ŝatatan esperantistan etoson, ankaŭ informiĝi pri la rezultoj de la anoncita fare de la loka E-societo „Espero" literatura konkurso.

Kaj vere: la gastoj vizitis kaj kun granda intereso transrigardis la tre bone aranĝitan Muzeon de Vasil Levski, kie ili konatiĝis kun interesaj kaj ne tre konataj momentoj el al vivo kaj agado de l' Apostolo kaj kun liaj fidelaj kunbatalantoj, kaŝantoj kaj helpantoj el Loveĉ. Post tio la gastoj riverencis antaŭ la impona monumento de l'Apostolo, staranta postene sur altaĵo preter la urbo.

Sed sendube kulmino de la renkontiĝo estis la amikovespero en la plej luksa restoracio de la urbo, portanta la saman nomon. Ĉi tie estis plenumita belarta programo, okazis komuna vespermanĝo kaj dancoj.

Aparte streĉa estis la momento, kiam la prezidanto de la ĵurio, Kunĉo Vălev, anoncis la rezultojn de la literatura konkurso pri originala kaj tradukita E-poezio, dediĉita al la 45-a datreveno de la socialisma revolucio en Bulgario. En la konkurso estis prezentitaj 35 verkoj. La sekretariino de E-societo „Espero" d-rino Mirena Denizova, enmanigis memoraĵojn al la premiitoj.

Ĉi-jare, kiel ĝis nun, la tradicia Siringa Vespero plene sukcesis. Ni kredas, ke tio okazos ĉiam ankaŭ estonte. Garantio por tio estas la amo de la dommastroj al Esperanto, ilia iniciatemo kaj energio.

KOVO

PREMIITOJ

ORIGINALA POEZIO

I premio: Nikola Pilev el Ĥaskovo — pro la versaĵo „Revolucio".

II premio: Cvetanka Uzunova el Sofio — pro la versaĵoj „Aŭskultu, panjo", „Filo" kaj „Surtomba krono".

III premio: Lilija Sotirova el Plovdiv — pro la versaĵo „Libero"; Blagovesta Uzunova el Ĥaskovo — pro la versaĵo „Patrino mia"

TRADUKITA POEZIO

I premio: Nikola Uzunov el Ĥaskovo — pro la traduko de la versaĵoj „Kanto pri la ses infanoj el Jastrebinovo", „Komunistoj" de Slav Karaslavov kaj „Konfeso" de Georgi Ĝagarov.

II premio: Stefka Stamatova el Plovdiv kaj Nikola Pilev el Ĥaskovo — pro la komuna traduko de la versaĵo „Libero", de Petro Konstantinov.

III premio: Nikola Stranĝanski el Burgas — pro traduko de la versaĵo „Burgasaj komunistoj" de Nedjalko Jordanov.

JURIANOJ:

Prezidanto: Kunĉo Vălev
Membroj: Asen Matev,
Ilija Ivanov

20-JAROJN E-SOCIETO EN GÂLÂBOVO

En Gâlâbovo, Ĥaskovo-departemento, okazis Princlanda E-Balo dediĉita al la 20-jariĝo de la fondiĝo de loka E-societo „Kolombo de la Paco". Ĉeestis ties membroj kaj gastoj el Svilengrad, Ĉirpan, Dimitrovgrad, Măglij, Drjanovo, Aĵtos, Kazanlâk, Simeonovgrad, St. Zagora, Ŝipka k. a.

Nejko Kunev, organizanto de CE de BEA pri Ĥaskovo-departemento, malfermis la Balon kaj salutis la membrojn de „Kolombo de la Paco". Okazis literatura-muzika programo. La atmosfero estis agrabla kaj amuza.

Mihail ĈOBANOV

FLUGAS INFANDESEGNAĴOJ

La ligoj de pazarĝikaj esperantistoj kun alilando estas tradicie riĉaj kaj fruktodonaj. Pazarĝikanoj tre atente zorgas servi al ne-esperantistaj medioj por kultura kunlaboro kun alilandaj institucioj por pruvi al ili kaj al la socio la eblecojn de Esperanto.

Jen, pasintjare E-societo „Radio" peris, por ke infandeseĝnaĵoj de gelernantoj el elementa lernejo „Otec Paisij" atingu nederlandan lernejon „St. Josef" en Heemskerk. Tie en decembro 1988 estis aranĝita sukcesa ekspozicio per la pentraĵoj de niaj gelernantoj kaj ĵurio prijuĝis specialajn diplomojn al 7 gelernantoj kaj memoraĵojn por ĉiuj, kiuj sendis pentraĵojn. La gastanta al pazarĝikaj esperantistoj nederlandano Sara Freeke alportis la diplomojn kaj la memoraĵojn kaj transdonis ilin al la infanoj. Tio estis neforgesebla renkontiĝo-festo por la lernejo, samkiel la renkontiĝo de Sara Freeke kun la societanoj (ŝia restado en Pazarĝik estis menciita en la kultura kroniko de du sinkvaj numeroj de la loka ĵurnalo). Tiamaniere nia esperantistino Katja Kâlvaĉeva kaj Ton Verwoerd el Nederlando kreas favorajn kondiĉojn por Esperanto en ambaŭ lernejoj.

Pli malnova estas la ligo de nia societo kun lernejo „G. Dimitrov", kie pentroarton instruas Kostadinka Dimova. Ŝi preparis du komplektojn de pentraĵoj. Ni sendis unu el ili en urbo Drogobiĉ — USSR. Tie estis aranĝita ekspozicio kaj ĵurio distingis ne nur la plej belajn pentraĵojn, sed ankaŭ sendis specialan atestilon por la lernejo. Nun la ekspozicio estas sendita al alia soveta urbo, kies esperantistoj kunlaboras kun nia societo.

La alian kolekton de pentraĵoj ni sendis al la E-societo en Eger — Hungario, kaj tie en junpionira domo estis aranĝita unumonata ekspozicio, post kio la pentraĵoj estis senditaj al alia nia ĝemela societo — en Bologna, Italio.

Tiamaniere nia Esperanto-domo ne nur gajnas amikojn por nia lando en aliaj landoj, sed ankaŭ bonan terenon por nia laboro. En lernejo „G. Dimitrov" jam 4-an jaron ni instruas Esperanton fakultative, kaj en lernejo „Otec Paisij" duan jaron funkcias esperantista studrondo.

Kaj tio estas nur unu el la aktivecoj de nia Esperanto-domo.

Petko ARNAUDOV



TURISTAJ ARANĜOJ

● Dum la lasta semajfino de marto (25—26.03), okazis sur monteto Bakâgicite apud urbo Jambol Dua Nacia Renkonto de la Turistoj-Esperantistoj. Dank' al la vasta informado tiun ĉi landan aranĝon aliĝis kaj partoprenis 118 gesamideanoj el 14 loĝlokoj. La salono de la montodomo „Amikeco” estis ornamita per Esperanto-sloganoj. La dommastroj-esperantistoj el urbo Jambol prezentis riĉan kaj varian belartan programon. Multajn aplaŭdojn ricevis Junulara Kantgrupo „Ruĝaj Fajreroj”, kies direktanto estas Liljana Paraŝkevova. Dum la printempa balo oni multe amuziĝis kaj dancis. Samkiel pasintjare okazis Esperanto-kvizo kaj tombolo.

La sekvan tagon Nikola Nikolov, vicprezidanto de la Asocio „Monda Turismo” kaj prezidanto de la Turista Sekcio ĉe BEA, prelegis je temo „Internacia kaj bulgara Esperanto-turismo”. Per ciferoj kaj faktoj li skizis la supreniron de nia turismo. La ĉeestantoj vizitis vidindaĵojn.

Estas notinde, ke la belarta programo, prelego, kvizo kaj tombolo okazis en Esperanto. Ofte la partoprenantoj interparolis Esperante. Tion lerte instigis la dommastroj kaj niaj veteranoj: Hristo Manolov el Polski Trâmbeŝ, Geno Manev el Drjanovo k. a.

● Antaŭ nelonge en Sofio okazis Konferenco de la Turista Sekcio ĉe BEA. Ĝin partoprenis ĉirkaŭ cent delegitoj — aktivaj turistoj-esperantistoj el 17 loĝlokoj.

La salono estis bele ornamita per verdaj flagetoj, slogan-rubandoj kaj koloraj afiŝoj pri bulgaraj naturbelajaĵoj. Dudeko da anoj de la Sofia Esperanto-Koruso salutis la konferencon, plenumante belan programon el turistaj Esperanto-kantoj kaj versaĵoj.

Dimitâr Mutuŝev, prezidanto de la Turista Sekcio ĉe Bulgara Esperantista Asocio, prelegis pri temo „Stato kaj disvolviĝo de Esperanto-turismo en Bulgario”. Lia prelego abundis je faktoj kaj konstatoj pri la evoluo de nia turismo kaj de la asocia turista sekcio. Li skizis kio estas farenda por plibonigo de la multnombraj turistaj E-aranĝoj en Bulgario. 14 partoprenantoj parolis pri sia agado en la turisma sfero kaj kion oni intencas fari por antaŭenpuŝi nian movadon per aktiva turista agado. Multaj konkretaj proponoj estis faritaj: kunlaboro kun ekstermovadaj turismaj instancoj kaj organizoj, fondo de novaj kluboj; okazigo de pli longdaŭraj turismaj aranĝoj: gvidado de praktikaj konversaciaj E-kursoj por turistoj k. a. Tiujn proponojn oni inkluzivis en la akceptitajn decidojn de la Konferenco.

La sekcia estraro estis kompletigita. Inter la naŭ kandidatoj estis elektitaj: Dimitâr Petrov, Hristina Ivanova, Kiril Hlebarov, Ivan Ivanov kaj Miĥail Trifonov. Dum kunsido de la sekcia estraro prezidanto estis elektita unuanime la aktiva esperantisto kaj turisto Nikola Nikolov. Al la ĝisnuna multjara prezidanto D. Mutuŝev oni esprimis laŭdon pro la bona gvidado de la Turista Sekcio.

La Konferenco pasis en Esperanto. Oni vigle parolis, diskutis kaj pasie disputis Esperante.

N. N.

KUN KANTOJ EN ESPERANTO

Ne sufiĉas nur lerni la lingvon. En ĝi oni devas ankaŭ verki kaj kanti. Tiel ĝi pruvas sian vivkapablon.

Profunde konvinkitaj pri tiu vero, dum la aŭtuno de 1987 kelkaj entuziasmoj el E-societo „Espero” en urbo Gorna Orjaĥovica — Enĉo Balanov, Dimitâr Petkov, Zorka Suvanĝieva kaj Dora Zlateva, decidis organizi ĉambran ĥoron. La ideo ricevis subtenon kiel de la estraro, tiel ankaŭ de ĉiuj esperantistoj. Komenciĝas provkantadoj. Oni lernas kantojn de fremdaj kaj bulgaraj komponistoj „Dormiga kanto” de Ŝubert, „Montaraj pintoj” de Rebikov, „Kusanta Todora” de Filip Kutev k. a. Plej aktivaj ĥoranoj estas Sijka Jabanĝieva, Marija Petrakieva, Zorka Suvanĝieva, Valentina Prodanova, Nevjanka Predova, Timka Jankova, Jordanka Todorova k. a. En siaj kostumoj en klasika stilo ili aspektas tre belaj kaj elegantaj sur la koncertaj podioj.

En decembro 1987 la ĥoro por unua fojo kantas okaze de la datreveno de d-ro Zamenhof. Ĉiuj estas ĝojaj kaj kontentaj pro la sukcesa prezento. Sekvas invitoj kanti en urboj Polski Trâmbeŝ, Veliko Târnovo, Loveĉ. En Pisanica ili partoprenas en muzika seminario kaj en internacia koncerto. Ĉi tie ili konatiĝas kun ĥoro el la litova urbo Paneveĝis. Komenciĝas korespondado, sekvas reciprokaj gastadoj.

Aŭtune de 1988 en urbo Pleven dum regiona konkurso nia ĉambra ĥoro gajnis unuan premion.

Per sia arto la ĥoro gajnas la korojn de la partoprenantoj en decembro 1988 en la solenaĵoj okaze de la 80-jariĝo de nia E-societo „Espero”.

La ĥorestro Enĉo Balanov estas tre kontenta de siaj ĥoristinoj ĉar ili laboras persiste kaj sindone.

Plej ĝojiga estas tio, ke la ĥoristinoj lernas Esperanton en unuagrada kurso. Ilia gvidantino estas inĝeniero Darina Geranlieva. Ĉiuj lernas kun granda deziro por ekposedi la lingvon.

Tiel, niaj ĥoristinoj el Gorna Orjaĥovica kreas intereson al la internacia lingvo Esperanto kaj argumentas per siaj kantoj, ke ĝi estas lingvo de la amikeco inter la apartaj homoj kaj la popoloj.

Angel MÂGLOV

INTERESA KAJ UTILA ELDONO

Okaze de la Tago de urbo Veliko Târnovo — la 22-an de marto k. j., Ŝtata Biblioteko „P. R. Slavejkov” en la urbo eldonis 14 bibliografiajn faldfoliojn pri diversaj temoj rilate Veliko-n Târnovo-n, ekz. mezepokaj ornamaĵoj, ceramiko, antikvaj preĝejoj, pontoj, monumentoj, legendoj pri la urbo, la urbo en popolaj kantoj, numismatiko, filatelo. Estas faldfolio ankaŭ pri temo „Esperanto kaj Veliko Târnovo”. Ĝin verkis Hristina Karamiĥova kaj Olga Cankova. Ĝi enhavas 44 bibliografiajn unuojn — la unua — de 1907, la lasta — de 14-a de julio 1988, ĉerpitaĵoj el 14 bulgarlingvaj periodaĵoj kaj libroj. Eldonkvanto — 1000 ekz.

Tiu estas interesa kaj tre valora eldono. La interesatoj petu ĝin senpage ĉe: Universala Naŭčna Biblioteka „P. R. Slavejkov”, 5000 Veliko Târnovo.

Foto: Kirilka SAVOVA

Foto de la numero: Kunsidas la redakcia teamo de „Bulgara Esperantisto”.



AL LA VERKEMULOJ

Ni jam multfoje skribis, sed denove ripetos: en fremdajn lingvojn, inkluzive en Esperanton, oni devas traduki nur la plej interesajn, la plej valorajn verkojn de la klasika kaj nuntempa bulgara literaturo. Bedaŭrinde, lastatempe ni ofte ricevas tradukojn de poemoj kaj rakontoj, verkitaj de duagrada kaj eĉ triagrada aŭtoroj. Kompreneble, ni ilin ne publikigos ne nur pro manko de loko, sed antaŭ ĉio pro konsidero de estetikaj postuloj, malgraŭ ke iuj el la tradukoj posedas ceterajn kvalitojn. Tio koncernas niajn legantojn kaj kunlaborantojn **Marijka Taneva el Karnobat, Maria Belčeva el Ruse, Elka Nikolova el Sofio.**

En aliaj okazoj la elektita aŭtoro vere meritas tradukadon, sed la tradukinto ne elektas liajn plej karakterajn verkojn kaj proponas al ni publikigi tute hazardajn, ofte fruajn kaj jam netipajn por li literaturaĵojn. Tio koncernas, ekzemple, nian kunlaboranton **Nikola Stranĝanski el**

Burgas, kiu sendis al ni tradukojn de du versaĵoj de Nedjalko Jordanov.

Kvankam la aŭtoro **Vasil Avramov** ne estas konata, mi estis korusita de lia poemo pri la instruisto Janoŝ Korĉak, kiu ĝis siaj lastaj minutoj en la faŝisma koncentrejo rakontas fabelojn al la infanoj. Sed la traduko de la poemo, kiun sendis al ni **Penka Porolieva el urbo Levski**, kvankam laŭvorta, malproksimiĝas de la originalo — en ĝi estas nek rimoj, nek ritmo de la frazoj.

Ni kore dankas al samideano **Jozef Bielik el Ĉeĥoslovakio** pri liaj bonaj vortoj rilate al la „nova vesto” kaj la enhavo de nia revuo. Ni tamen ne publikigis lian versaĵon okaze de la Oka de Marto, ĉar laŭ ni ĝi bezonas ne nur ceterajn lingvajn plibonigojn por fariĝi vere arta verko.

Kiu traduko de poeziaĵo estas bona kaj kiu malbona? Ekzistas sur tiu ĉi temo diversaj opinioj, sed estas

unu absolute necesa postulo: la traduko devas „soni” nature, flue, kiel originalo. Nia samideano **Čaba Bige el Rumanio** sendis al ni tradukojn de kvar poemetoj sen aldoni la originalojn. Jen pro tio ni ne povus diri ĉu laŭsence ili estas proksimaj aŭ malproksimaj de la originaloj, sed tute evidenta estas la fakto, ke la poeziaj sentoj ien forflugis — la strofoj estas artefaritaj, sekaj, plenaj je gramatikaj eraroj.

La vera poezio ne bezonas klarigojn sub linio, ĝi mem parolas pli klare kaj pli forte ol ĉiuj analizoj. Tiun ĉi evidentajn mi rememoris legante la sespaĝan leteron, kiu akompanas la unupaĝan versaĵon de **Nejko Nejkov el urbo Dve Mogili**. Al vi, kara samideano, ni rekomendas, unue, detale ellerni la leĝojn de la poezia verkado, perfektigi vian lingvon kaj poste sendi novajn literaturaĵojn al ni.

Venelin MITEV

NESTO DE BIRDOJ

NESTO DE BIRDOJ. Literatura Antologio. Bulgara Esperantista Asocio, Sofio, 1987. Formato 22 × 15,5 cm. Prezo 1.10 lv.

En la historio de la bulgara Esperanto-movado la agado de la esperantistoj el urbo Ĥaskovo kaj ĝia regiono ĉiam okupis konsiderindan lokon. Jen pro tio ne estas miriga la fakto, ke nur jaron post la apero de la poemaro „Homoj, antaŭen!” kun verkoj de Penjo Penev — libro, kiu fariĝis evento en la traduka Esperanta literaturo — ili jam proponis al la legantoj novan, tre interesan eldonon en Esperanto — 238-paĝan literaturan antologion. Ĝi estas titolita „Nesto de birdoj” kaj konsistas el tri ĉefaj partoj. La unua parto prezentas tradukitajn en Esperanton poemojn kaj rakontojn de aŭtoroj, loĝantaj kaj deve-

nantaj de Ĥaskovo; la dua — originalajn verkojn poeziajn kaj prozajn de membroj de la loka „Belarta Klubo”, la tria — historiajn paĝojn el la Esperanto-movado en la regiono.

Per la en Esperanton tradukitaj verkoj la eksterlandaj legantoj povus fari realan pritakson pri la belarta majstreco de aŭtoroj kiel Asen Zlatarov — profesoro, eminenta sociaganto, publicisto kaj literaturisto, granda amiko de la esperantistaro, Emanuil Popdimitrov — aŭtoro de pluraj lirikaĵoj, Toma Izmirliev — fama poeto-humoristo, Penjo Penev — poeto de la konstruado, de la krea entuziasmo de la bulgara popolo post la venko super la faŝismo en 1944, Nikola Inĝov kaj Nikolaj Hristozov — aŭtoroj de pluraj poeziaĵoj kaj beletraj libroj k. m. a. La tradukojn de la verkoj faris Violin Oljanov, Nikola Pilev, Nikola Uzunov

Fani Miĥajlova, Tonka Dimitrova, Penjo Stojanov kaj aliaj esperantistoj el la tuta lando, kiuj jam pruvis sian talenton majstre interpreti belartajn verkojn.

„Tri poetoj — tri poeziaj mondoj” estas titolita la eseo de Georgi Miĥalkov, kiu enkondukas nin en la duan parton de la libro. Kaj li pravas: la poeziaĵoj de Nikola Pilev, Nikola Uzunov kaj Penjo Stojanov vere havas iujn komunajn trajtojn, ĉar por la triopo „Esperanto-poezio ne estas vivrimedo, sed bezono” tamen ĉiu el ili diversmaniere esprimas siajn plej korajn pensojn, revojn kaj sopirojn. La bukado el originalaj poemoj, kiun ili prezentas en la antologio, estas buntkolora kaj multtara. Se la poemoj de Nikola Pilev similas al internaj monologoj, la verkoj de Nikola Uzunov sonas al voke entuziasme li preferas la pli


vervan poezion, kaj la verkoj de Penjo Stojanov tre ofte enhavas fortan dramecon kaj emocion.

Tre interesa estas ankaŭ la tria parto de la libro, kiu celas konigi al la legantoj iujn historiajn paĝojn el la Esperanto-movado en la regiono de Ĥaskovo. Esperanto-societo „Radio“ estas inter la unuaj E-societoj en Bulgario — ĝi estas fondita en 1903. Fiero por la esperantistoj de Ĥaskovo estas la fakto, ke en la unua nomaro de esperantistoj en la mondo, farita de d-ro Zamenhof, enestas la nomoj de kvar esperantistoj el Ĥaskovo. Dum la kruela ba-

talo kontraŭ la faŝismo pereis la aktivaj membroj de la Laborista Junulara Asocio (RMS) kaj fervoraj esperantistoj Tenĉo Hubenov, Todor-ka Paunova, Ivan Rajkov kaj Dimităr Kanev-Aŝika. En 1969 kaj en 1985 Ĥaskovo estis ĉefa organizanto de la junularaj festivaloj, kiuj estis inter la plej bone preparitaj revuoj de la E-parolo kaj kanto en la lando. En februaro 1986 en Ĥaskovo estis fondita „Belarta Klubo“, kies ĉefa rolo estas unuigi la agadon de esperantistoj el la tuta regiono, kiuj okupiĝas pri literaturo, muziko kaj aliaj artospecoj.

La aŭtoro de la antaŭparolo de la libro, verkisto Anton Miĥajlov esprimas esperon, ke bulgaraj kaj eksterlandaj esperantistoj akceptos favore la antologion, ke ĝi fariĝos malgranda fenestro, tra kiu ili pli bone vidus, ekkonus kaj espereble ekŝatus la regionon de Ĥaskovo, tiun renovigitan, belan parton de Bulgario. Laŭ mi, la antologio „Nesto de birdoj“ pro sia riĉa enhavo, la bonaj tradukoj kaj pro la originalaj poeziaj verkoj tute pravigas tiun ĉi esperon.

V. M.



Kun siaj antikvaj preĝejoj Nesebâr allogas milojn da bulgaraj kaj eksterlandaj turistoj



BRAZILIO. Aaron, brazila kantisto de „La Mondanoj”, surbendigis en Rio de Janeiro kasedon kun E-versioj de famaj brazilaj kantoj. Informoj: AHOI, R. Ant. Parreiras 146/901, BR—24.210 Niteroi, R. J.

GDR. Bona ebleco praktiki Esperanton estas la radioamatorismo. Wolf Krüger havis per la voksigno Y23HE pli ol 74 000 eterkontaktojn kun 160 landoj, plejparte kun esperantistoj.

POLLANDO. Finfine estas preta filmo pri Bjalistoko sub titolo „Bonvenon al Bjalistoko”. Produktis ĝin „Interpress-Film”, reĝisoris Roman Dobrzyński, kamerao — Andrzej Machnowski. La filmo daŭras 50 minutojn kaj havas polan kaj Esperantan version.

Tio estas la unua dokumenta filmo pri Bjalistoko kaj, kiel ni vidas, Esperanto estas kaŭzo kaj preteksto de la filmado.

Ĝi unue prezentas la urbon mem, kiel modernan centron de industrio, arto kaj scienco. Eĉ pli interesa estas alia parto, kiu montras la ĉirkaŭaĵojn plenajn de naturaj raraĵoj, kiel granda praarbaro de Bjalovieja aŭ la plej vastaj en Eŭropo marĉo-terenoj. Oni preskaŭ flaras de la ekrano la purecon de la aero, trankvilon de la naturo kaj admiras pitoreskajn pejzaĝojn.

Sed eble, el esperantista vidpunkto, la plej interesa parto de la filmo estas tiu, kiu montras daŭran varieton de la loka kulturo. Oni prezentas ankaŭ la Zamenhofaĵojn kaj la placon, kie oni planas konstrui E-centron. Verŝajne la filmon oni povos spekti en la UK en Braĵtono.

SOVET-UNIO. Internacia ekspedicio „Colum-

bus—500” sur polimaranoj estas planata por la periodo 1989—1991. La ekspedicio sekvos la vojon de Kristoforo Kolumbo, la 500-jariĝo de kies vojaĝo estos celebrata en 1992. Laborlingvoj de la internacia organiza komitato estas la rusa, angla, hispana kaj Esperanto. La pozicioj de Esperanto en tiu aranĝo tamen plene dependas de la esperantista subteno.

La plano de la ekspedicio aspektas jene:

Aŭgusto — septembro 1989 — Balta itinero: Tallinn, Helsinki, Stokholmo, Gdansko, Litovio, Estonio, Tallinn.

Somero 1990 — Eŭropa itinero: Tallinn, Helsinki, Svedio, Danio, FR Germanio, Nederlando, Belgio, Anglio, Francio, Portugalio, Hispanio.

Samsezone (plano nun vartata) — Azia itinero: Koreo, Ĉinio;

Somero 1991 — Transatlantika itinero: Kadisko (Hispanio), Kanariaj Insuloj, Kubo, Usono; **projekta samsezone** — Transpacifika itinero: Ĉinio, Japanio, Usono.

Por ebligi tion el materiala flanko, la komitato konstruigas samtempe tri polimaranojn — aldone al la veterano, kiu staras en Tallinn.

La supre priskribitaj itineroj povus esti modifitaj konforme kun internaciaj Esperanto-aranĝoj, se oni ricevos sufiĉe frue invitojn. La ekspedicio haltos en tiuj havenaj urboj, el kiuj venos oficiala invito al la adreso: **Prez. Robert Rääkkönen, ekspedicio „Columbus—500”, Klubo „Vojaĝoj por defendi pacon kaj naturon”, pr. Mira 36, SU—129010 Moskva.**

INTERLINGVISTIKA SIMPOZIO

Apliko de komputiloj, lingvistiko, faka terminologio, sociaj problemoj de la Esperanto-movado, analizo de lernolibroj kaj vortaroj — jen kelkaj ĉefaj temoj de la prelegoj de 17-a Scienca Interlingvistika Simpozio, kiu okazis en la konferencujo „Caritas” apud Varsovio (1—4.05.89). La bonegaj kondiĉoj kaj perfekta organizado ebligis al ĉirkaŭ 30 partoprenantoj el 7 landoj ne nur aŭskulti la interesajn prelegojn, sed ankaŭ detale pridiskutadi ilin foje eĉ ĝis malfrua vespero.

Ilona Koutny el Budapeŝto rakontis pri la eblecoj de maŝina tradukado el hungara en Esperanton kaj pri la lingva evoluo kaj planado. Hermann Tautorat (Okcidenta Berlino) prelegis pri Esperanto kaj informati-

ko. Antoni Golonka kaj Wojciech Usakiewicz analizis polajn-esperantajn vortarojn, la tradukon de apartaj vortoj kaj esprimoj antaŭe kaj nun. Ryszard Rokicki rakontis pri la afiksoj kaj afiksoidoj. Estis prezentita projekto de nova planlingvo — „Demolingwo”, de la nederlandano W. Verloren van Themaat.


Kelkaj prelegoj estis pri sociaj problemoj de la Esperanto-movado kaj ĝia historio de Zofia Banet-Fornalowa kaj Jarosław Parzyszek (Pollando), Rolandas Stramkauskas (Litovio), Attila Kaszas (Hungario); aliaj temis pri la faka terminologio Jan Pioro, Andrzej Warszawski k. a. Esperantina Mirska rakontis pri la infanoj en Esperanto-familioj.

La bulgaraj esperantistoj partoprenis per tri prelegoj. Kremona Băceva surbaze de analizo de kelkaj lernolibroj argumentis la bezonon de pli perfekta gramatika lernolibro. Antoaneta Nikolaeva rakontis pri la preparata filologia terminaro. Kiril Velkov proponis, ke dum estontaj internaciaj kosmoflugoj estu uzata Esperanto kiel interkomprenilo, kaj menciis la lingvajn kaj terminologiajn problemojn tiuaspekte.

Specialan lokon en la programo de la Simpozio okupis la teatra prezentado de Jerzy Forhal — „Konfeso el Ŝeolo” pri la sorto de Albert Einstein.

Kiril VELKOV

Mezopotamio kaj Babilono



Mezopotamio estis nomata la teritorio inter la riveroj Tigriso kaj Eŭfrato. Ĝi okupis preskaŭ la tutan hodiaŭan Irakon. Mezopotamio verŝajne estis pli dense loĝata ol Irako, ĉar la kulturata fruktodona tero estis pli vasta kaj provizis la loĝantaron per nutraĵoj. La nunaj informoj pri Mezopotamio montras, ke signoj de homa vivo datiĝas de tre malproksima pasinteco. La malmultaj trovaĵoj, konfirmantaj la fruan ĉeestadon de homoj en tiu lando, devenas precipe de Norda Mezopotamio. Ju pli ni proksimiĝas al la historiaj epokoj, des pli elstaras Suda Mezopotamio. Nome tie aperis la historie gravaj ŝtatoj: Sumero, Akado, Babilonio kaj Asirio.


La historio de la mezopotamia civilizacio naskiĝis antaŭ kelkaj jarmiloj en la suda parto de hodiaŭa Irako. Ĉirkaŭ la kvina jarmilo a. K. la nekonata sumera popolo ekloĝis en la malalta ebenaĵo de Eŭfrato, kaj tie kreigis unu el la plej antikvaj civilizacioj. Tiu popolo venis verŝajne el Norda Azio, el la montaroj de Tibeto. En Mezopotamio mankis bazaj kruaĵoj: ŝtono, metalo kaj ligno, kiuj povus faciligi la evoluon de la civilizacio. Kompense, dank' al la

disbranĉigita irigacia reto, la tero estis fruktodona kaj troviĝis argilo, el kiu oni konstruis templojn, palacojn kaj loĝejojn. Sur argilplatojn, komence per figuroj, kaj poste per kojnoskribo la sumeroj enskribis siajn tekstojn. Tio estas dokumentoj, kiuj donas al ni eblecon profunde penetri la historian periodon de Mezopotamio, kie fakte disfloris kulturo, karaktera per imponaj konstruaĵoj kaj kreaĵoj de la arto. En la konstruado oni uzis ŝtonon kaj aliajn konstrumaterialojn, importatajn el malproksimaj, eĉ el transmaraj landoj. Tio parolas pri vigla komerco inter la antikvaj popoloj.

Ambaŭ ŝtatoj Babilonio kaj Asirio, kun loĝantaroj parolantaj en parencaj dialektoj de akada lingvo, en daŭro de pli ol mil jaroj estis la plej grandaj regnoj de Mezopotamio, kiuj ofte konkuris inter si. Tamen Babilonio konservis dominantan rolon en la sfero de arto. Ba-

bilionio fakte estis malpli potenca en la politiko. Cetere, la babilona kulturo famiĝis en proksimaj kaj foraj landoj. Pri tio atestas ankaŭ la fakto, ke en la antikveco la akada lingvo estis la diplomacia lingvo en Oriento. La plej grava centro de la mezopotamia kulturo estas Babilono. Nome tie sumeranoj kaj akadanoj kunloĝadis dum jarcentoj kaj kreis altan kulturon kaj civilizacion, kiuj disvastiĝis al la najbaraj landoj. Heredintoj de tiu kulturo estiĝas ankaŭ la aliaj semidaj popoloj.


La plej pompan disfloron la babilona kulturo atingis dum la regado de Hamurabo kaj liaj filoj. Hamurabo (1730—1685 a. K.) estas la sesa reganto el la babilona dinastio kaj unu el la famaj regantoj en la antikveco. Nome li estas la aŭtoro de la fama jurkodo, kiu fakte prezentas la unuajn leĝojn en la historio de la homaro. La malnovbabilona lingva, scienca kaj kultura heredaĵo



Babilono — strato de procesioj

ekzistis kiel modelo inda por imitado ĝis la dekadenco de la mezopotamiaj ŝtatoj. Post la politika regreso de Babilono, sur ĝian kulturon senĉese efikis fremda influo. Malgraŭ tio la babilona kulturo daŭre estis forta kaj ĝiaj atingoj konserviĝis eĉ en la nuna civilizacio. Dum sia tuta ekzistado ĝis hodiaŭ, en la diversaj epokoj, Babilono jen apogeis, jen dekadencis. La fama urbo, centro de la monda kulturo en la antikveco, plene ruiniĝis. Hodiaŭ la iraka registaro zorgas pri la restarigo de la antikva urbo. Iuj ĝiaj elementoj konserviĝis ĝis hodiaŭ, aliaj, kiel ekzemple Pordo de Ištar, jam estas plene rekonstruitaj, kaj la fama Leono de Babilono rakontas pri la mitoj ĉe la antikvaj popoloj.

Karaj legantoj, la historio donas informojn pri multaj eventoj, okazintaj en la antikva Babilono. Nome tie troviĝas la famaj pro sia grandeco temploj, palacoj, altaj muregoj. Tie troviĝis ankaŭ la neimageblaj aerĝardenoj de Semirama.



Pordo de Ištar

Fotoj: la aŭtoro

Krome, en la antikva Babilono oni komencis konstrui la legendan Babelturon, en kies konstruado, laŭ la legendo, la Eternulo konfuzis la lingvon de la tuta Tero. Nun kiam mi laboras proksime al la historia Babilono kaj ĝuas ĝiajn vidindaĵojn, kiam mi promenas sur la Strato de Procesioj, do mi komprenas, ke Babilono fakte ekzistis. Sed ĉu ĝis la ekkonstruo de la Babelturo ekzistis unu-

nura lingvo? Se ĝi vere ekzistis, ĉu la homoj, bone komprenante unu la alian, estis feliĉaj?

Ni akceptu ankaŭ la jenan varianton: ĉu ne eblas, ke la homaro jam en la antikveco, parolante en diversaj lingvoj, ĉiam serĉis vojon al unu komuna lingvo?

Babilono, en februaro 1989

Georgi M. MIĤAJLOV

Gesamideanoj el la tuta mondo, saluton!

La esperantistoj neniam estas solaj, ili ne maljuniĝas...

Antaŭ tri jaroj mi ricevis leteron de juna esperantistino el urbo Abakan, USSR — Valentina Lukjanova. Kun plezuro mi respondis al ŝi — jam mia 300-a korespondantino. Ŝi skribis al mi, ke dum la Dua Mondmilito ŝia patro estis oficiro kaj lia tuta familio loĝis en urbo Sliven, Bulgario. Tiam ŝi estis 8—10-jara infaneto, kaj nun ŝi multe ŝatas viziti nian landon kaj urbon Sliven. „Venu — mi respondis, — plezure mi renkontos vin, — tio estos bonega ideo.

Antaŭpasintan someron iu telefonis al mi: „Saluton, kara Ivanka! Mi estas Valentina el urbo Abakan“... Pro emocio mi ne povis paroli. — Mi ferias kun sovetia grupo en ripozdomo „Genciano“ ĉe la bordo de Nigra Maro — klarigis Valja. — Venu, mi volas intervidiĝi kun vi“ — mi respondis. Venontan tagon Valja sonoris ĉe la pordo. Sur la pordo staris surskribo: „Sonoru laŭtel!“ Ridetante Valja montris al mi la surskribon kaj diris: „Tio estas speciale por mi“... Ni ĉirkaŭprenis nin, kisis unu la alian kaj ploris pro ĝojo. Mi estis tre kon-

tenta, ke Valja parolas tre bone Esperanton. Multaj vortoj, demandoj... Ni kune manĝis, vizitis magazenojn, sukeraĵojn, E-klubejon „Albatroso“, kie Valja konatiĝis kun la esperantistoj Apostolov kaj Hristo Cvetkov kaj kun grupo de ĉeĥoslovakaj gesamideanoj.

Ni kun bedaŭro adiaŭis. Ni ne sukcesis ekskursi kune al mia vinberejo, ĉar ŝi rapidis. La venontan tagon Valja devis veturi al Sliven.

Poste en sia letero al Ivanka Koleva Valentina Lukjanova skribis: „En librovendejo en Varna mi aĉetis libreton en bulgara lingvo de bulgara verkisto Aleksandar Manko — „La filo de Puŝkin“. Mi eklegis ĝin supraj kaj eksciis, ke filo de nia grandega poeto A. S. Puŝkin, kiun mi tre ŝatas, estis heroo en la Liberiga Rusa-Turka Milito 1877—1878.

El ĉiuj miaj bulgaraj impresoj en mia animo naskiĝis versoj, kiujn mi verkis en mia lasta „bulgara tago“ kaj recitis ilin en la Adiaŭa Vespero de nia grupo“.

Ivanka KOLEVA
Varna

Antaŭen al Marso!

La nomo de planedo Marso lastatempe estas ofte uzata. Kosmaj stacioj sendis valorajn informojn pri ĝi kaj ĝia pli granda satelito. Krome, ekzistas reala ebleco, ke ĝi fariĝu la dua astro (post la Luno), vizitita de teraj kosmonaŭtoj.

Kion ni scias pri nia kosma „najbaro”? Ĉiujn du jarojn nia Tero proksimiĝas al Marso, kaj foje en 15—17 jaroj la distanco estas tre malgranda — ĉirkaŭ 56 milionoj da km. Proksimume antaŭ jarcento, observante Marson dum tia renkontiĝo, itala astronomo A. Skiapareli rimarkis malhelajn liniojn kaj nomis ilin kanaloj. Poste aliaj sciencistoj komparis la spektron de Marso kun spektroj de arboj, kiuj kreskas en la tundra kaj trovis, ke ili estas similaj. Tiel aperis eĉ nova scienco-astrobotaniko kaj ĝiaj adeptoj pruvis, ke tie estas flaŭro, kiu printempe ricevas akvon de la degelantaj polusaj neĝoj kaj verdiĝas. Ekzistas eĉ mapoj de Marso kun la kanaloj, maroj kaj ebenaĵoj. Dum multaj jardekoj estis famaj fikciaj romanoj pri invado de marsanoj al nia Tero.

Alia iluzio naskiĝis jam en la 50aj-60aj jaroj. Sovetia astronomo profesoro I. Ŝklovskij, komparante malnovajn kaj novajn observojn de la satelitoj de Marso, trovis kelkajn deflankiĝojn en ties rotacio. Do, li kalkulis, ke tio povas okazi, se nur ili estas artefaritaj kaj eĉ proksimume nomis la jaron de ties lanĉo. (Interalie, poste Ŝklovskij fariĝis unu el la plej aktivaj kontraŭuloj de la ideo pri eksterteraj civilizacioj.)

En la lasta kvaronjarcento kosmaj aparatoj sendis multajn informojn kaj nia imago pri Marso ŝanĝiĝis. Kanaloj tie mankas, estas nur krateroj, ĉenoj de krateroj. Maroj kaj oazoj ankaŭ ne ekzistas; nur dezerto kovrita de ruĝkolora sablo. Estas tiom da sablo, ke ĝi kaŝas la tutan surfacon de la planedo, kiam komenciĝas tempesto. Super la sabla tavolo estas videblaj nur la plej altaj montoj Arsia kaj Olimp. Oni povas vidi sur la fotoj fluejojn de sekiĝintaj riveroj, grandegajn kanjonojn (ekzemple Mariner, longa pli ol 400 km). La blankaj polusaj ĉapoj konsistas ĉefe el karbona dioksido, sed certe tie estas ankaŭ akvo.

Unu el la plej grandaj surprizoj okazis, kiam usona sciencisto Vinsent Di Pietro prilaboris fotojn, senditajn de la kosmaj stacioj „Viking”. Ili estas entute pli ol 300 000, kaj ĝis nun ĉirkaŭ 20 procentoj de ili estas esploritaj. Do, sur unu el tiuj fotoj Di Pietro rimarkis monteton kun diametro 1,5 km kaj alteco 300 m. Ĝi aspektas kiel vizaĝo de homo, kun okuloj, nazo, buŝo, hararo. Kiam la foto de tiu vizaĝo (kiu ricevis la nomon „marsa sfinkso”) aperis en la gazetaro, multaj sciencistoj esprimis sian opinion pri ludo de la naturo. Tamen, uzante komputilon, Di Pietro plibonigis la disigan kapablon. Li trovis ankaŭ duan foton de la sama

vizaĝo, faritan 35 tagojn post la unua. Sur ambaŭ fotoj estis rimarkeblaj bukloj de paĝio, pupiloj en la okuloj, dentoj en la duonmalfermita buŝo. Kaj sur la lumigita de la suno vango estas rimarkebla ŝtona larmo. Di Pietro kaj lia kolego Molenaar konkludis: „Se la multenombraj detaloj de tiu ŝtona kapo formiĝis naturre, do la naturo devas esti mensa estaĵo”.

Proksime al la sfinkso troviĝas kelkaj piramidoj, kies eĝoj estas 1.5 km. Ĉu la naturo povas produkti tiajn rektliniajn korpojn? La supro de upo el la piramidoj estas detruita kaj oni povas rimarki, ke ĝi estas kava.

Poste en alia loko de Marso estis trovita dua homvizaĝo, kiu tre similas la unuan, eĉ ĝi havas saman bukulan hararon.

Ĉu vere ambaŭ vizaĝoj — en la regionoj Sidonio kaj Utopio estas monumentoj de antikva civilizacio? Pensante pri tio, ni devas ankaŭ memori pri la aliaj elreviĝoj, kiujn Marso prezentis al ni. Certe la lastan vorton havos nur ekspedicio, kiu estas planata por la jaroj 2005—2010.

Ĝia efektivigo havos diversspecajn problemojn. Unue, necesos krei novajn raketojn, kiuj ebligas pli grandajn rapidecojn. Due, ili devos porti tre pezan ŝarĝon — aparatojn, nutraĵojn, akvon, aeron. Trie, necesas solvi la problemojn de la komunikado kun la ekspedicio. Malfacila problemo estos savi la skipon okaze de danĝero.


Necesos bone aranĝi la protektadon kontraŭ la kosma radiado. Estas ankoraŭ multaj detaloj, tute ne bagatelaj, ekzemple la influo de la senpezeco, la energiaj problemoj ktp.

Sufiĉe grava estas ankaŭ la financa flanko de la projekto, kiu atingos, aŭ eĉ superos 100 miliardojn da dolaroj. Ĉar sur la Tero estas multaj taskoj, kiuj postulas monon, ekzistas pluraj kontraŭuloj, opiniantaj, ke en la venontaj 50 jaroj ni ne bezonas flugon al Marso.

Kompreneble, ni ne devas pensi, ke simila ekspedicio serĉos nur kuriozaĵojn. Ĝi faros multajn seriozajn esplorojn, kiuj devas respondi al demandoj pri la origino kaj estonto de Marso kaj de nia planedo.

Do, ĉu post dudek jaroj realiĝos la alvoko de unu el la pioniroj de kosmonaŭtiko — Fridriĥ Cander: „Antaŭen al Marso“!?

k. t. sc. Kiril VELKOV



Deziras korespondi

BULGARIO

GRUPO de fakuloj pri bioteknologioj, elektroniko serĉas kontaktojn. Komuna adreso BG 5000 Veliko Tŕrnovo, P. K. 15. Maria Pejkoŭa.

VENKA BIRIMIRSKA - BG—1505 Sofio, ul. „Sultan tepe” 2 — dez. kor. kun gesamideanoj super 50 jaroj pri ĉt.

VESELA BOŠNAKOVA (13-jara) kaj IVANKA BOŠNAKOVA (44-jara) — BG—2100 gara Elin Pelin, kv. 14, bl. 3, ap. 26 — kun ĉl pri ĉt.

KRASIMIRA MINĈEVA (29-jara) — BG—2260 Svoĝe, ul. „Gaber” 8 — kun ĉl pri ĉt, kolektas bk kaj pm.

FRANCIO

S-ro MOTA RENÉ — F—94400 Vitry S/Seine, 13, voie Bouchardon — dez. interŝanĝi insignojn de urboj, kluboj kaj politikaj partioj.

GREKIO

GEORGIOS KOREKSENIDIS (25-jara) — 56429 Tesaloniko, Stavropolis, Panagi Tsaldari 5 — kun ĉl pri ĉt.

HUNGARIO

EVA SZUTS (14-jara) — H—5100 Jászberény, Tóborzó ú. 27 — kun bulgara lernantino pri ĉt.

RITA SZABÓ (19-jara, infanistruistino) — H—4100 Berettyóújfalva, Szillér u. 28 — dez. kor. kun knaboj 20—23-jaraj.

POLLANDO

ALICJA JURCZYK (34-jara) — PL—98—200 Sieradz, ul. Jagiellońska 24/6 — kun ĉl pri vojaĝoj, libroj.

BOGDAN GRAJEK (21-jara, oficisto) — PL—88421 Lubcz, Lubcz 24 — kun ĉl pri filatelo kaj historio, kolektas pm, bk.

ELZBIETA MACOWICZ (21-jara studentino) — PL—51—250 Wrocław, ul. Bratkowa 19 — pri turismo, sporto kaj literaturo.

KRZYSZTOF ZERO (30-jara) — PL—87—600 Lipno, ul. Łączna 31 — kun ĉl pri ĉt.

JADWIGA ŁADZIAK (24-jara) — PL—98—161 Zapolice, woj. sieradzkie, Kol. Belen 29 — kun ĉl pri ĉt.

LUCJAN MARCINIAK (40-jara) — PL—58—513 Dziwiszów, Dziwiszów 203 — pri turismo kaj literaturo, kolektas bk.

SOVETUNIO

DENIS POLANSKI (14-jara) — SU—454092 Ĉelabinsk, ul. Kurĉatova 8—60 — kun ĉl pri lingvoj, historio, fotografio, kolektas pm.

IRINA ŜCANOVSKAJA (24-jara inĝenierino) — SU—224023 Brest, Moskovskaja, 340—248 — kun ĉl pri Esperanto, kolektas bk, pm.

SVETLANA KUĆIC (26-jara flegistino)* — SU—224000 Brest, Vorovskogo, 11—1 — pri medicino, sporto, vojaĝo.

VĽADISLAV VUJEK (46-jara ŝoforo) — SU—224005 Brest, K. Marx 53—20 — pri sporto, vojaĝo, kolektas bk, pm, insignojn.

VLADIMIR JUROMSKI (29-jara biciklvojaĝanto) — SU—232038 Litovio, Vilnius, ul. Rodunes Keles 8 — kun ĉl pri aviado, kolektas mapojn, urboplaneojn, bk, insignojn.

JUNULARA INVALIDA ORGANIZO — SU—425200 Masr, Medvedevo, Tereŝkovoĵ 16—36, Maksim Sitnikov - dez. kor. kun invalidoj el ĉl.

RAIMONDA PUGŴLITĖ (17-jara) — SU—235300 Litovio, Panevėžys, Statybininkų 3—28 — kun ĉl pri muziko, kolektas diskojn, prospektojn.

GRUPO de daŭriga E-kurso (16—50-jaraj) — SU—235307 Litovio, Panevėžys, Beržu 50 — dez. kor. kun samspecaj grupoj tutmonde.

MEZLERNEJANOJ — SU—200016 Tallinn, 10. Keskool, Esperanto Ring — dez. kor. kun 12—16-jaraj samaĝuloj tutmonde.

FILATELO

Asocio „Komunikado” en Bulgario emisiis la 12-an de aprilo 1989 specialan poŝtan blokon dediĉitan al „10 jaroj de la unua kuna soveta-bulgara kosma flugo” kun nominala valoro 1 levo (du markoj po 50 stotinkoj).

Aŭtoro de la projekto estas la pentristo Stefan Gruev.

Formato de la poŝtbloko: 130 × 90 mm (horizontale).

Formato de la apartaj poŝtmarkoj: 32.5 × 45 mm (vertikale).

Papero: blanka gumita, 100% celulozo.

Prestekniko: ofseta.

Presejo: Ŝtata Presejo de Asocio „Komunikado” — Sofio.


Eldonkvanto: 180 000 (dentumitaj-numeritaj), 12 500 (nedentumitaj numeritaj).



NE FORGESU!

Estimataj legantoj,

Pasis preskaŭ jaro de kiam „Bulgara Esperantisto” havas „novan vestaĵon”. Dum la pasinta tempo vi ankaŭ ĝuis (laŭ viaj leteroj) la pli varian enhavon, pli bonkvalitajn grafikaĵojn kaj fotojn. Plimultiĝis la nombro de niaj legantoj eksterlandaj. Jam pri la revuo interesiĝas esperantistoj el 47 landoj.



Se vi dezirus ankaŭ ricevadi „BE” dum 1990, vi povus aboni ĝin. En Bulgario tio eblas dum la abonkampanjo pere de la poŝto kontraŭ 4,80 lv. En ĉiuj socialismaj landoj — pere de la koncerna poŝto. Por ĉiuj aliaj landoj —

pere de UEA aŭ niaj perantoj kontraŭ 32 nederlandaj guldenoj aŭ egalvaloro en nacia valuto. La abonprezo por socialismaj landoj, pagita en Bulgario estas 7.32 lv., por la aliaj landoj — 7.80 lv. Tiumaniere bul-

garaj esperantistoj havos eblecon aboni nian revuon ankaŭ por siaj eksterlandaj amikoj.

Sekvontjare la Redakcio proponos al sia legantaro:

- interesajn legaĵojn por ĉiu aĝo;
- E-novaĵojn el Bulgario kaj la mondo;
- artikolojn sur diversaj aspektoj de la E-movado;
- altkvalitajn publikaĵojn sub la rubrikoj: „Lingvaj demandoj”, „Esperanto en profesioj”, „Originala verkaro”, „Leteroj de korespondamiko”, „Juna esperantisto”, „Distra paĝo”, „Verdaj steletoj”, „Deziras korespondi” k. a.

VI ĜUOS DENOVE BELASPEKTAN KAJ LUKSAN ELDONKVALITON.

Niaj perantoj:

Britio

S-ro Paul Hewitt, 26 Highfield Road, North Thoresby Grimsby, South Humberside DN 365 RT

Japanio

S-ro Yoshiaki Mizuno, Hanazono 1—2418—18 Tokorozawa 359

Ĉiu deziranto estiĝi peranto de „BE” eksterlande povus turni sin al la Redakcio. La rabato por la perantoj estas 25%, el la kolektita abonsumo.

JAM ALVENAS ABONTEMPO. NE FORGESU ABONI VIAN, JAM 70-JARAN REVUON — „BULGARA ESPERANTISTO”!




Distroj

MAGIA ENIGMO

Horizontale kaj vertikale: 1. Solena celebulo de grava datreveno. 2. Kemia elemento, metalo, laŭvica numero 56 laŭ la tabulo de Mendeleev. 3. Speco de malgranda malhelblua ĝis nigra frukto de arbusteto kreskanta precipe en konifera arbaro. 4. Urbo en Belgio. 5. Sciencisto pri strukturo, konsisto kaj historio de la tero.

Cvetan MANOJLOV



LA PREMIO

Ĉi-foje nian vortenigmon, publikigitan en n-ro 2/1989, solvis: Atanas Gaev (Asenovgrad), Cveta Popova (Pernik), Jordan Dobrev (Sofio) kaj d-ro Otto Kaczinski (GDR).

Post lotumado la premion gajnis Cveta Popova — str. Dimo Haĝidimov 1/8, 2300 Pernik. Ŝi ricevos la libron „Mia trezorejo“ de Ivan Ŝivarov. Gratulon!

„BE“

SOLVOJ DE LA VORTENIGMO — n-ro 2/1989

1. Egido. 2. Ignor. 3. Lagro. 4. Gaŭĝo. 5. Loĝio. 6. Skolo. 7. Stoko. 8. Strut. 9. Uralo. 10. Atolo. 11. Talio. 12. Ikaro. 13. Dramo.

KELKAJ PROVERBOJ

● *Iu diris: „Niaj vizaĝoj estas kiel horloĝoj, ili montras la forpason de l'tempo.“ Prave, sed la horloĝoj povas ankaŭ frui aŭ malfrui pro internaj aŭ eksteraj influoj.*

- *Esub la tero aperas la vero.*
- *Kiu donas rapide, donas duoble.*
- *Amiko fidela estas trezoro plej bela.*
- *Eĉ bagatelo povas servi al celo.*

MALKOVRU OK DIFERENCOJN.

